3-a Jaro. N-o 133—134 APERAS  SEMAJNE 16. Aprilo 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA


Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XII^e	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XX^e	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

EL MANĈURIO

Manĉurio estas nord-orienta parto de granda Ĉinio, nun havas ĉirkaŭ 16 000 000 loĝantojn kaj okupas 940 000 kv. metromilojn. Ĝi lokiĝas inter Koreo, Sibirio kaj Mongolio. Ĉine la lando estas nomata ne Manĉurio, sed Ŝen-Czin. Manĉuroj estas preskaŭ tute ĉiniĝinta negranda enlanda popolo (nun ĉirkaŭ 1 000 000), kiu sukcesis en la jaro 1616 venki tutan Ĉinion kaj regi ĝin ĝis la lasta revolucio detroniginta lastan reĝon-manĉurion en 1912. Fakte Manĉurio nun estas diktatore regata de fama reakciulo Ĉan Czo Lin kun lia generalaro. Ili samtempe estas politik-, milit- kaj mastrumestroj de la lando, ĉar ili estas administrantoj kaj samtempe akciuloj en diversaj entreprenoj kaj bankoj, kiuj estas en preskaŭ ĉiuj urboj de Manĉurio. Ĉiuj ĉi bankoj rajtas moneldoni kaj trouzas la rajton, invadinte la landon per diversspeca papermono. La mono nun ege senvaloriĝis, ĉar fakte ĝi estas garantiita nur per baseta ordonvoĉo de maljuna Ĉan. La senvaloriĝo mizerigas antaŭ ĉio vilaĝanaron, kiu estas plej granda parto de ĉi-tiea loĝantaro. Profitemaj bankoj aranĝas siajn aferojn tiel, ke ili arte plivalorigas sian monon dum ili aĉetas kamparproduktojn de vilaĝanoj (precipe sorgo, milio, maizo, fabo) kaj ili resenvalorigas ĝin kiam ili, vendinte la produktojn, malkare reaĉetas malnovajn monsignojn, bank-biletojn. Poste ili ree altigas prezon de ĉi-biletoj por re-



Laojan — tipa urbo de Manĉurio. Ekonomia vivo de Manĉurio rapide disvolviĝas kaj same kreskas urboj kaj relvojaro, kiu nun jam longas pli ol 2500 metromilojn.



Manĉuria banko en urbo Ĥarbin ĉe transsibiria fervojo kaj rivero Sungari. En la jaro 1910 la urbo havis nur 12 000 loĝantojn, nun — ĉirkaŭ 370 000. Alia granda urbo de Manĉurio Mukden nun havas pli ol 350 000 loĝantojn, sed en 1910 ĝi havis nur 250 000.

komenci tian sistemecan prirabadon de vilaĝanaro. Krom tio Ĉan Czo Lin, kiu bezonas monon por senĉese militi, tre altigas impostojn. En la jaro 1924 la terimposto estis altigita je 80 % kaj en la jaro 1926 ankoraŭ je 50 %. Krome, en nuna jaro estis ankaŭ altigitaj tabak- kaj salimpostoj pagataj arĝente kiel ĉiuj impostoj. Vilaĝanaro impostojn pagas arĝente, sed vendas siajn produktojn por papermono, do malprofitas duoble! Por iom resanigi sian monsistemon Ĉan aranĝis devigan internan prunteprenon de 50 milionoj da dolaroj. Sed la devigo retrafas vilaĝanaron, ĉar ĝi devas realigi 47 % de la prunto. Same suferas urbanaro (kiu en Manĉurio rapide kreskas), ĉar prezoj de milio (ĉefnutraĵo de laboristoj kaj vilaĝanoj) altiĝis je 20 % sole dum unu aŭtuno de 1926 jaro. Malkontento de loĝantaro nature kreskas kaj igas vilaĝanojn kuniĝi kun laboristoj kontraŭ nuna registaro, post kies dorso jam bone sentiĝas tutmonda kapitalismo. Kelkie jam okazas ribeletoj kaj dika nuko de maljuna Ĉan ne estos bone gardata dum lia militiro kontraŭ revoluciemaj sudanoj kiuj nun jam regas en Ŝanhajon kaj aliaj gravaj urboj. Ne savos lin profesiaj militistoj, rusaj blankuloj, kiujn li amase varbas por sia armeo.

Maksim Krjukov.



Specimeno de manĉuriaj bankbiletoj, kiuj pli kaj pli invadas la landon. 5 centonoj da ĉina arĝenta dolaro aŭ laŭnome 5 sovetiaj kopekoj. Dorse estas klariga teksto "internacia" en la lingvoj angla, rusa kaj mongola.

Striko en Turkio

En Turkio estas nur unu partio politika, tiu estas la registaro, konsistanta el la landnobelaro. Nenia opozicio estas permesata, do tute ne ekzistas movado socialista aŭ komunista. Antaŭ ne longe grupo da laboristoj petis de la registaro permeson fondi socialistan organizaĵon, kiun registaro rifuzis, donante, kiel motivon, la fiaskon de socialismo en Eŭropo (kompreneble, ĝi aludis al Sovetio).

La registaro vendas monopolon por ĉiu industria kaj komerca ekspluatado al grupoj kapitalistaj, kies anoj estas membroj de la registaro; tiel reganta klaso lanugas siajn nestojn, senplumigante la pacan kaj laboreman loĝantaron.

Nenia gazeto aŭ ĵurnalo ekzistas en la lando por defendi la interesojn de laboristoj. La gazeto, kiu kuraĝas meti artikolon, defendanta la intereson de la "suba hundo" (?) estas tuj malpermesata.

Jam de antikva tempo ŝarĝoŝipoj ankradas sur la rodo de Bosforo. Centoj da ŝarĝistoj kun barkoj alportadis kaj forportadis varojn, gajnante tiamaniere iom da mono por vivado. Sed en nuna respublika reĝimo, la vivo fariĝis tre malfacila por multaj el tiuj ŝarĝistoj. La registaro vendis monopolon de transŝarĝado al privata kapitalista kompanio, kiu ne uzas la servojn de ĉiuj ŝarĝistoj, pro kio granda nombro grade mizeriĝas. Tio kaŭzis, ke la ŝarĝistoj rapide organizis sin kaj postulis, ke la kompanio uzu ĉiujn barkojn laŭvice. Monopolo tion rifuzis fari. Okazis granda kunveno de ŝarĝistoj en mezo de januaro, kiuj deklaris strikon je la tempo kiam estis urĝe necese senŝarĝi grandan kvanton da komercaĵo. Monopolo vokis policon por devigi la senŝarĝistojn ĉesigi la strikon. Okazis batiĝo, dum kiu kelkaj policanoj estis ĵetitaj en la maron, kaj kelkaj laboristoj kaj policanoj estis vunditaj. Pli ol 300 laboristoj estis arestataj, inter ili ilia maljuna sekretario; baldaŭ la plejmulto estis liberigitaj, sed 33 estis kulpigataj pro diversaj faroj. Post sidado en karcero dum 47 tagoj je la fino de februaro ili estis juĝataj. Kamaradoj, kiuj iris al juĝejo por aŭskulti al la juĝado devis submeti sin al severa kontrolo de poŝoj kaj vestaĵoj, por ke neniu protestu per revolvero aŭ alia "argumentilo". Ili estis kulpigitaj pro batado kaj insultado kontraŭ policanoj "dum plenumo de ilia devo". Kelkaj estis senkulpigitaj, sed dek estis kondamnitaj al malliberejo, kie ili restos de tri ĝis ses monatoj.

Granda antagonismo ekzistas, inter la monopolo kaj la (ne laŭleĝa) unuiĝo de ŝarĝistoj, kies nombro estas 2881. Dum la proceso la unuiĝo en longa petskribo al la registaro petis, ke ĝi ekzamenu la disputon, kaj klarigis, ke 900 barkoj staras en la Ora Korno neuzataj kaj, ke 2881 ŝarĝistoj estas senlaborigitaj kaj sen iu subvencio. Ankaŭ la unuiĝo petis, ke la registaro transdonu al ĝi ĉiujn aranĝojn pri transŝarĝado de komercaĵo, kio estos farata per la plej nova metodo teknika. Kompreneble, la registaro estas pli interesata pri sia monopolo ol pri laboristoj. La monopolo proponas, ke ĝi aĉetos de la ŝarĝistoj la barkojn, por kiu ĝi mem difinos la prezojn, kaj ŝarĝistoj, kiuj sub tiu kondiĉo vendos siajn barkojn, estos dungataj kiel simplaj laboristoj de la monopolo. La direktoro de monopolo publike deklaris, ke li zorgos ĉe la registaro, ke la peto de la ŝarĝistoj restu senrespondo.

E. E. Y.

Propagandu

per speciala leterkoverto je memoro de la 40-jara datreveno de esperanto kun portreto de D-ro Zamenhof.

Prezo: 100 ekz. 2.— mk. g.

Adm. de SAT.

LETERO EL PERSIO

"O-o, Allah-akber (Granda dio), savu nin, viajn humilajn sklavojn, de niaj pekoj en ĉi mondo!" — jenan preĝon trifoje en la tago — matene, tagmeze kaj ĉe la malleviĝo de l' suno — ripetas la persa kamparano, laborante en rizaj kamparoj. Li serioze opinias, ke tro grandaj estas liaj pekoj antaŭ Allah, ĉar laborante de mateno ĝis malfrua vespero, li ne havas eblecon, multe da tempo fordoni al la preĝo.

Ne sen kaŭzo tiamaniere opinias nia kamparano: en ĉi mondo vere li estas orfo kaj, ĉirkaŭ li, ĉiuj konstante ripetas, ke sama orfo li estos ankaŭ post sia morto. Nia kamparano estas kredeble la plej malriĉa, ĝis almozeco, kaj malfeliĉa en la tuta mondo. La tero, kie li laboras, kaj eĉ la akvo, per kiu li akvumas ĉi teron, ne estas lia propraĵo, sed tiu de bienuloj kaj ĥanoj.

La persa kamparano prilaboras sian terpecon per la plej primitivaj instrumentoj; pri la teknikaj plibonigoj en terkulturado li scias nenion[1]). Unuvorte — en ĉiuj rilatoj niaj kamparanoj ankoraŭ ĝis nun travivas Mezepokon.

Laborenspezoj de ĉiuj membroj de familio apenaŭ sufiĉas por ke ili ne mortu pro malsato. Kaj laboras ordinare ĉiuj, viroj kaj virinoj, eĉ malgrandaj infanoj. Sen ripozo, ofte malsana, kamparano devas labori starante ĝis la genuoj en la akvo. Ĉar ĉe nia kamparanaro estas tre disvastigita fumado de opio, la elcento da malsanuloj inter ili estas tre granda. Pri mortintoj neniu ĉagrenas, ĉar ĉiuj havas pli "gravajn" aferojn.

Senklerecon de persaj kamparanoj uzas ĉiuj, kiuj ne estas maldiligentaj;

[1]) Espereble tamen okcidentuloj aŭ usonanoj ne trudos al la persa kamparano plugmaŝinojn, ĉar tiaokaze li perdus la grandan privilegion vivi en "sendependa" lando, kiu havas eĉ reprezentanton ĉe la Ligo de Nacioj!!.. — *Red.*

ĉiuj ilin senindulge ekspluatas: marĉandistoj,ŝtataj oficistoj, armeo, princoj, ĥanoj kaj fine "sankta familio" de di-servantoj.

Diversspecaj servantoj de dio — seidoj, ahundoj, imamoj, derviŝoj kaj aliaj — seninterrompe vagas tra la lando, eltirante de la kamparano lian lastan moneron kaj instruante necesecon por la filoj de Oriento pacience atendi paradizon en la ĉielo.

"Bism-il-lah rahman Allah" — (unusola Dio estas Allah kaj krom li forestas aliaj) — flugas al ĉielo trifoje en la tago kamparanaj preĝoj kaj denove ĉagrenas perso, ke peniga laboro malhelpas al li sufiĉe da tempo doni al preĝo.

Ĉu iam li komencos konstrui mem sian feliĉon ĉi-tie, sur la tero? *Rafig*, Persio



La industria laboristino en Hispanujo

Mi nun parolos pri la situacio, en kiu troviĝas la korka regiono Palafrugello (Palafruĵeljo).

Tre malbone estas la ekonomiaj kondiĉoj de la ĉi-tieaj loĝantoj. La virinoj, ĉu patrinoj, ĉu fraŭlinoj, estas devigataj labori pro la mizero kiu ekzistas ĉe iliaj proletaraj hejmoj. (Kutime antaŭe, kaj eĉ nun en multaj partoj de la lando, virinoj laboras nur en sia propra hejmo). En la industrioj, kie tio estas eble, oni dungas nun virinojn, kiuj estas preferataj pro la burĝa motivo, ke ili estas malpli fortaj ol la viroj kaj sekve, devas akcepti malpli da salajro.

Nia taga salajro estas 3 aŭ 4 pesetoj; tamen la mastroj, malgraŭ la "virina malforteco", devigas al ni fari la saman kvanton kaj kvaliton de laboro kiel la viroj, sed ĉi-tiuj lastaj ĉi-tie gajnas po 6 aŭ 7 pes. tage.

Tiel la burĝoj atingas du celojn; unuflanke la laboristinoj ne povas kleriĝi, pro tio, ke ili post laciga 9-hora labortago ĉe la fabriko, estas devigataj fari la tutan hejman laboron kaj, dank' al ĉi-tio, ne havas tempon priokupiĝi pri emancipigaj ideoj; kaj duaflanke, ju pli da virinoj laboras, despli da viroj fariĝas senlaboraj, el kiuj oni povas elekti sklavojn je malaltaj salajroj.

La laborista movado ĉi-tie ne estas sufiĉe forta por kontraŭstari ĉi-tiujn burĝajn taktikojn; sed tamen ekzistas geuloj kiuj antaŭenpuŝas la proletajn interesojn, malgraŭ la sennombraj baroj de niaj sociaj malamikoj. Neniu povas haltigi la homan evoluon ...

Subite nuntempe multaj el ni virinoj restas ankaŭ senlaboraj. Supozeble, ke la mastroj havas planon por malaltigi la salajrojn.

Ĉe la kork-fabriko, kie mi laboras, mi nun povas labori nur kvar tagojn dusemajne. Mi gajnas 4 pesetojn tage; sed la virinoj de ĉi-tiu fabriko gajnas la plej multon el ĉiuj. La laboro, kiun mi nun faras estis antaŭe — de antaŭ unu jaro — farita de viroj, kiuj gajnis 7 pesetojn tage. Tiele la mastroj rabas al proletoj 3 pesetojn ĉiutage.

Ĉe la fabriko, ĉiuj maŝinoj estas bonaj kaj pro tio la burĝoj ŝparas laboristojn. De mia hejmo ĝis "mia" fabriko, oni devas paŝi kvaronhoron.

Kiam la mastroj maldungas laboristinon, ili nenion al ŝi donas krom por la laboro farita. Kiam ŝi estas graveda, ŝi lasas la laboron unu monaton antaŭ la nasko kaj alian post ĝi. En ĉi-tiu vilaĝo nur estas du fabrikoj, ĉe kiuj la gravedaj virinoj ricevas subtenon pri siaj cirkon-



K-dino Tereso Karbó (8160)

stancoj. Ĉe la aliaj fabrikoj oni donas nenion kaj la virinoj, timante pri maldungo, ne kuraĝas peti ion. Estas eĉ fabrikoj en kiuj la mastroj, vidinte, ke iu virino estas graveda, maldungas ŝin.

En ĉi-tiu vilaĝo ekzistas nenia grupo feminista.

La prezoj de vivbezonaĵoj ĉi-tie estas jenaj:

Terpomoj . . .	kilogramo	0,50	pesetoj
Gado	„	3,00	„
Pano	„	0,65	„
Rizo	„	1,00	„
Sukero	„	2,00	„
Kafo	„	10,00	„
Porkaĵo	„	5,00	„
Bovaĵo	„	5,50	„
Kokaĵo	„	10,00	„
Oliv-oleo	litro	2,60	„
Lakto	„	0,70	„
12 Ovoj		2,00	„
12 Sardeloj . . .		1,20	„

Kiel vidite, la prezoj estas tre altaj rilate la salajrojn.

La domo kie mi loĝas kune kun mia familio ne estas nia; pagas ni por ĝi 26 durojn (duro egalas 5 pesetojn), sed nuntempe ĝi estas el la plej malmultkostaj. Preskaŭ ĉiuj domoj porlaboristaj kostas de 28 ĝis 35 durojn.

Tereso Karbó (8160).



Prospero en Aŭstralio sub laborista regado

La burĝoj en Britio sin nomas "la reganta klaso" kaj asertas laŭtvoĉe, ke la Laboristaro ne kapablas regi; kaj tiu lasta ofte perdas sian tempon alrespondante la demandon: "Ĉu la Laboristaro kapablas regi?" anstataŭ simple klopodi por ke tio estu.

La statistiko publikigita de la aŭstralia registara statistikisto devus fari finon al la senfunda vanteco de la britia burĝaro, tial ke ĝi pritraktas landon en kiu 5 el la 6 ŝtatoj havas laboristan registaron. La escepto, Victoria, nun prepariĝas por ĝenerala voĉdonado je aprilo 9-a kaj tre ŝajnas, ke estos laborista plimulto, ĉar ĵus okazis en parlamento 4 venkoj kontraŭ la nuna regado.

Produktado en Aŭstralio nun egalas proksimume 85% pli ol en 1911, kiam la konservativuloj plejparte regis. Ĉi tiu kalkulo estas farita laŭ pokapeco; tial neniu povas diri, ke enfluo de loĝantoj kaŭzis la pliiĝon. Ĉiu industrio raportas pri progreso kaj la fabrikoj rapide plimultiĝas kaj disvolviĝas.

Sed, plej grava estas la fakto, ke kune kun la progreso de l' produktado, ankaŭ progresas la bonstato de la laboristoj. La deponitaĵoj en la aŭstraliaj ŝparbankoj egalas funt. sterl. 32.8.8 po kapo, kompare al funt. sterl. 21.3.1 en 1917 j. La bankoj ĉiuj estas en tre prospera stato.

Ankaŭ sukcesas la amuzejaj entreprenoj — bona pruvo pri la ĝenerala situacio, ĉar tiuj entreprenoj unue suferas la konsekvencon de komerca malprospero. Nuntempe oni konstruas 4 novajn teatrojn en Sydney (Sidni), urbo de 1 miliona loĝantaro, aldone al la nunaj 9 teatroj kaj sennombraj kinematografoj, cet.

Ankaŭ elmontras prosperon la ŝipindustrio, la propraĵ-komerco kaj la asekuraj entreprenoj.

Sinjoroj de la britia "reganta klaso". alrigardu Aŭstralion!



LETERO EL POLIO

Teruraj estas la vivkondiĉoj de la pola Laboristaro. Por tion ilustri, mi citas la jenajn oficialajn ciferojn:

A) Laŭ la bulteno de la Internacia Laboroficejo (transdonata per la ministraro por laboro), la nivelo de **realaj** salajroj en diversaj landoj estas tia, ke, se ni fiksas la nivelon de l' reala salajro de londona laboristo je 100, la respektivaj salajroj proporcie estas:

1) Berlina	69	4) Praga	53	7) Riga'a	45
2) Pariza	60	5) Brusela	52	8) Viena	44
3) Madrida	56	6) Milana	47	9) Varsovio	43

(Mankas la cifero por Moskvo; eble la sovetaj K-doj povas plenigi ĉi-tiun mankon.)

Polio havas do la honoron resti sur la naŭa loko.

B) Ĉi-tion certigas ankaŭ la oficialaj eldonitaĵoj de la pola Ĉefa Oficejo Statistika, kiu diras, ke la minimumo de vivkostoj por unu familio de 4 personoj estis, la 30. 11. 1926 j., 9 zlot. tage, hodiaŭ jam plimulte[1]).

[1]) 9 zlotoj = 1 dolaro.

Kaj perlaborante tage, ricevas:

1. Teksisto de Lodz 5 zlot., (malpli ol 50% de la minimumo).
2. Metalurgisto kval. 6.80 zlot., (malpli ol 65% de la minimumo).
3. Karbministo 6.40 zlot., (malpli ol 61% de la minimumo).

La pago por prilaboro de 1 tuno da karbo estas 5.66 zlot., t. e. 18% de l' vendprezo ĉe la minejo mem; dum alilande la pago alproksimiĝas 50%.

Entute la salajroj de 1. 2. kaj 3. egalas 60% de la antaŭmilitaj realaj salajroj, kio signifas, ke laboristoj ne ricevas eĉ tiun salajron, kiu plenumus siajn minimumajn bezonojn.

Mi ankoraŭ ne parolis pri salajroj en aliaj fakoj, kiuj estas pli malaltaj. Junuloj ricevas pli malpli 1 zlot. tage.

Lastatempe estis publikigata jena interesa statistiko:

1 El la loĝantaro de Varsovio, kiu nombras ĉ. 1 milionon da loĝantoj, apartenas al la: -

a) Klaso supera (grand-financistoj, komerc- kaj industriistoj kaj la plej-bone situaciitaj de la t. n. liberaj profesioj), 1,35%; b) Klaso meza (mez-komercistoj, la plimulto da liberprofesiuloj kaj la mezkategorio de oficistoj publikaj kaj privataj), 16%; c) Etburĝaro, 14%; d) Proletaro, 68,5%.

2. El la profesie aktiva loĝantaro de Varsovio, perlaboras monate:

je pli ol 1000 zlot. 0,5%, t. e. 1 571 da personoj;

je 1000—250 zlot. 7,9%, t. e. 24 821 da personoj;

je 250—100 zlot. 32,7%, t. e. 102 733 da personoj;

je malpli ol 100 zlot. 58,9%, t. e. 185 063 da personoj.

C) El la profesie aktiva loĝantaro en tuta Polio, perlaboras monate:

je pli ol 1000 zlot. . .	0,1 %,
je 1000—250 zlot. . .	2,16%,
je 250—100 zlot. . . .	16,41%,
je malpli ol 100 zlot.	81,31%.

Malgraŭ la teruraj malaltaj salajroj de l' laboristoj, ekzistas por ili eĉ pli malbona stato, kiam ili sin trovas senlaboraj, aŭ pere de strik-agado aŭ pro ĝenerala reduktado. Ekzistas ĉe ni helpo por senlaboruloj, sed jen la mizeraj sumoj donataj:

Por solulo	1,50 zlot. tage,
Por 2 personoj . . .	1,75 zlot. tage,
Por 3—5 personoj . .	2,— zlot. tage,
Por 5 aŭ pli personoj	2,50 zlot. tage.

Komparu tiujn sumojn kun la minimumvivkosto de 63 zlot. semajne! Kaj ankaŭ notu, ke la senlaborulo ricevas la "helpon" nur 13—17 semajnojn post perdo de laboro. Poste li nur ricevas t. n. urĝan helpon. En Germanio estas male; post 9 semajnoj, la senlaborulo ricevas aldonon de 20%. Ĉe ni, post 6 monatoj, senlaborulo jam ne rajtas profiti eĉ de la malsanulkaso.

Kaj la senlaboreco pli kaj pli grandiĝas. La nombro da senlaboruloj estis:

Je 7. 11. 1926 . . .	196 522,
Je 1. 1. 1927 . . .	236 057,
Je 29. 1. 1927 . . .	251 702.

Hodiaŭ la nombro verŝajne jam estas 265—270 miloj.

Antaŭ la milito, la vivkondiĉoj de l' laboristo rusa egalis plimalpli tiujn de l' laboristo de Kongres-Polio. Kaj nun, kiel diferencas la vivkondiĉoj de soveta laboristo de tiuj de pola laboristo?...

(8703.)



Malliberula vivo en Estonio

Ĉiu pli-malpli granda urbo havas malliberejojn; ne mankas ili ankaŭ en la ĉefurbo de Estonio. Kvankam ili havas diversajn nomojn, ili esence malmulte diferenciĝas unu de alia, tiel ke, ekkoninte la veget-kondiĉojn en unu el ili, oni povas ankaŭ imagi, kiaj estas la aliaj.

Jam de ekstere la malafable aspektanta konstruo altiras la atenton pro la alta murego ĉirkaŭanta ĝin, pro sia ĉiam fermita pordego, pro la kradumitaj fenestroj, provizitaj krome per antaŭ-fenestraj lignaj kestetoj, celantaj malhelpi ke la malliberuloj elfenestrigu iujn skribaĵn informojn. Nur malofte oni vidas, kiel iu aliras la ĉiam ŝlositan pordegon kaj batas ĝin per speciala fera frapilo, kiel malrapide malfermiĝas kradfenestreto en la pordego, vidigante esplorrigardan okulparon, kaj kiel fine la frapinto estas enlasata, se la gardisto konvinkiĝis pri lia akceptebleco. Dum certaj tagoj oni vidas antaŭ ĝi ankaŭ vicojn da atendantoj, portantaj manĝaĵon al la enŝlositoj. Sed ĉiam la konstruo elspiras malserenon kaj senesperecon.

La tuta malliberejo estas dividita je diversgrandecaj ĉeloj, kiuj entenas po 20—40 personoj tiel, ke ili havas apenaŭ lokon por moviĝi. La "meblaro" estas simpla: tablo, benkoj, bretaro, litbenkoj, necesejo. La litbenkoj surhavas pajlosakon, littukon, pajlan kapkusenon kaj litkovrilon. La littolaĵo estas ŝanĝata unu fojon ĉiumonate, la korptolaĵo post ĉiuj du semajnoj. Ne mankas "hejmaj bestoj" — pedikoj kaj iuj nigraj malmolkirasaj skaraboj, kiujn la malliberula slango nomas "prokuroroj".

Matene la malliberuloj estas vekataj je la sesa, la vespera enlitiĝo okazas je duono antaŭ la dudekdua. Matene kaj vespere ili estas ellasataj el la ĉelo en lavejon; banejon. ili vizitas dufoje en monato — je ĉ. 25-personaj grupoj, lavad-tempo — 30—45 minutoj. Oni manĝas trifoje dum la tago. Matene estas donata varma akvo kaj kiel tuttaga porcio — 1½ funto[1]) da sekala pano, 1 peceto da sukero, ½-funto da salitaj klupejo[2]) kaj salo. Por tagmanĝo oni ricevas unu litron da supo: dufoje semajne gri-supon, dufoje terpoman, dufoje osmeran[3]) kaj unufoje pizan supon. Vespere ree oni donas varman akvon kaj po 3—4 terpomojn. La manĝilaro estas lada; ĝi estas purigata de la malliberuloj mem.

Nemultaj estas la okupoj de la malliberigitoj. Parto da ili laboras, unuj ekstere, aliaj en la ĉelo. Elpendaĵo ĉe la ekstera pordego anoncas, ke ĉiaspecaj labormendoj estas akceptataj por malalta pago. Tre malmulte oni pagas al la laboristoj kaj nur 50% el la perlaborita mono estas notata en iliaj "kontoj", la aliaj 50% estas retenataj de la malliberejа administracio. La nelaborantoj penas pasigi la tempon per legado, lernado, dormado, ludado, nelaŭtaj kantado kaj disputado. Nur libroj estas legeblaj; gazet-legado estis malpermesata antaŭ kelkaj monatoj kaj severa puno minacas nun ĉiun, ĉe kiu estas trovata presita paperfolio. La malliberuloj sciu nenion pri la okazaĵoj en la mondo, prefere ili havu tempon por pensi pri sia "krimo", por penti pri siaj pekoj. Verŝajne por pliinstigi al ĉi-tiu pentado, je la dispono de la enuantoj estas du — la solaj permesitaj — gazetoj kun dolĉaĉa religieklezia enhavo. Cetere, tio estas la sola religiaĵo prezentata al ili — predikoj ne okazas plu en la malliberejo kiel en antaŭaj tempoj. Maloftete okazas hazardaj prelegoj pri iaj temoj; dezirantoj povas partopreni regulajn kursojn pri diversspecaj lernaĵoj — ankaŭ esperanto — aranĝitajn de filantropa societo por prizorgado de la malliberuloj.

Unufoje dum la tago la malliberuloj estas ellasataj por duonhora promeno en la korto; dufoje oni ellasas samtempe ĉiujn loĝantojn en iu ĉelo al necesejo. Unufoje monate al ili estas donata papero por leterskribo — po unu letero monate ili rajtas sendi al siaj konatoj; antaŭ kelkaj jaroj estis permesate korespondi nur kun siaj proksimaj parencoj. Ĉiudimanĉe okazas gastakcepto en speciala ejo; kompreneble la vizitantoj estas apartigitaj de la vizitatoj per kradaro kaj observataj de ĉeestantaj gardistoj. Estas permesite alporti manĝaĵojn al la malliberuloj; frandaĵoj ne estas akceptataj.

La estroj kaj gardistoj estas diversaj laŭ karaktero kaj konduto: la "bonuloj" ne tiom ofte malfermadas la fenestreton en la pordo de la ĉelo por rigardi, kion la enŝlositoj estas farantaj; ili rilatas indulge al tio, ke iu dorlotas siajn rigidiĝintajn membrojn ĉe la varma forno aŭ kuŝsidas ĉe la tablo, kaj ili parolas kun ili kiel kun homoj — male, la "malbonuloj", ambiciuloj, fervore celantaj plaĉi al siaj superuloj, rilatas al ili kiel al bestsimilaj estaĵoj, malafable, krie, profitante je ĉiu bagatela kaŭzo por kulpigi ilin je

[1]) 1 klgr. = ĉ. 2½ f.

[2]) fiŝeto, parenca al haringo, longa ĉ. 10 cm.

[3]) osmero — malgranda marfiŝo, g. de salmoidoj (osmerus).

malobeemo al la interna ordo de la malliberejo kaj puni ilin per enkarcerigo. La karceroj estas mallumaj, malvarmaj, senmeblaj; oni rajtas teni en ĝi kulpulon maksimume unu monaton.

Tiel oni vivas de tago al tago, de monato al monato, de jaro al jaro, tiel kelkaj devas vivi 3-5-10-15 kaj pli multajn jarojn, eĉ iuj la tutan vivon. Horloĝon ili neniam vidas. Por kio ili bezonu ĝin? Ĝi mezuras sekundojn, minutojn, sed al ili gravas nur la dimanĉoj kaj — jaroj ...

Okazas, ke la mallibereco, la sencela vegetado iĝas netolereblaj por la plejparte sanaj, vivplenaj junuloj kaj ke ili penas forkuri el inter ĉi tiuj malserenaj muregoj. Malofte tio sukcesas; tro fortikaj estas la duoblaj seruroj kaj rigliloj de la ferumita ĉelpordo kaj la kradoj antaŭ la fenestroj, tro multaj estas la ŝlositaj kaj bone gardataj pordoj kaj pordegoj trairendaj por alveni la straton, tro rimarkebla la dukolora vesto de la punlaborulo. La kapharoj de la punlaboruloj ne estas iel speciale tondataj en ĉi tiuj malliberejoj, sed vestitaj ili estas per arlekenaj vestoj, faritaj per kunkudraĵoj el grizaj kaj nigraj ŝtofstrioj, rekoneblaj de malproksime. Kien oni forkuru en tia "paraduniformo"?

Kaj vole nevole oni devas daŭrigi la vegetadon — la kriminaluloj, esperante per bonkonduto atingi mallongigon de sia pundaŭro, la politikuloj, firme kredante, ke la tutmonda Proletaro ne forgesis pri ili, ke ĝi detruos la Malnovan, la maljustan kapitalisman sociordon, kaj liberigos siajn multesuferintajn K-dojn por komuna laboro por la Novo, por la hela, justa Estonto!

B-lo. (4227)



EL BRITIO

Senlaboruloj kaj la Armeo

Registara Komisio ĵus aperigis raporton pri la funkciado de l' senlaborula asekurado. Tiu "Blanesborough"-raporto rekomendas malaltigon en la monsubteno jene:

Por viroj	de 18 ŝil.	ĝis 17 ŝil.
„ virinoj	„ 15	„ Neniu ŝanĝo
„ junuloj (18—21 j.)	„ 18	„ ĝis 10 ŝil.
„ junulinoj (18—21 j.)	„ 15	„ „ 8 „
„ knaboj (16—18 j.)	„ 7½	„ „ 6 „
„ knabinoj (16—18 j.)	„ 6	„ „ 5 „

Tuj post la eldono de ĉi-raporto, aperis la Armea Jar-Raporto, kiu bone klarigas la kialojn por la supre-cititaj rekomendoj. Dum la 12 monatoj finiĝantaj je la 25-a de septembro 1926, okazis malgrandiĝo en la nombro de novaliĝintaj rekrutoj. Dum la jaroj, la nombro da rekrutoj fine aprobitaj por militservi estis 28 987; kompare kun 31 919 en la antaŭa jaro 1924-25, la malgrandiĝo proksimiĝis 10%.

La Raporto sciigas, ke 22 204 el la rekrutoj estis inter la 18 kaj 21 jaraj, t. e. el la vicoj de junaj laboristoj. "La fakto", daŭrigas la Raporto, "ke laboristoj akiras monsubtenon de la asekura kaso, grave malhelpas rekrutadon".

Tiuj plendoj klarigas, ke la "Blanesborough"-raporto rekomendas malaltigon de monsubteno al junuloj **ĉefe por devigi ilin aliĝi al la militistaro.**

La armea Raporto diras, ke "dum la industria barakto kaj la necerteco, kiu daŭris depost la lokaŭto de l' karbministoj, la nombro de homoj validaj por militservo falis je 25% sub la normo. Multaj el la junaj ministoj aliĝis al la armeo, sed la plejmulto de l' viroj je milita aĝo kaj tipo sin detenis." La superuloj lamentas, ke "en la urboj, la tasko de la rekrutaj oficistoj estis tre malfacila".

Kvankam la armeo treege sopiras al novaj rekrutoj, el 83 093 sin proponantaj, 54 931 estis neakceptataj. La malakceptitoj pro korpa kaj malsana netaŭgeco, estis 48 800, t. e. 58%. Tamen la nombro de malakceptitoj en la j. 1912 ĝis 1913 pro similaj difektoj, estis nur 26%.

Malkontenteco kreskas en la armeo. Lastan jaron, la nombro de forkurintoj sumis 1 397. Proksimume 60% el la soldatoj estas malpli aĝaj ol 25 jaroj.

La senlaborula "sindikato" forte agitadas kontraŭ la proponoj de la "Blanesborough"-Komisio, ankaŭ kontraŭ la nova leĝo, kiun la registaro minacas voĉdonigi de la Parlamento, por forpreni de l' senlaboruloj la balotrajton. Tiu proponata leĝo celas malfortigi la subtenon al la Laborista Partio, ĉar la senlaboruloj (proks. 2,5 milionoj) emas subteni la radikalulojn.

I. Flower (3398).

MARTO EN MEZA GERMANIO

Marto estas unu el la plej okazplenaj monatoj en la historio de la laborista klaso en Germanio. Por la germanaj proletoj, ĝi estas memormonato, la festmonato de la mortintoj, kiam ĉiujare marŝas centmilioj da laboristoj al la tombaro de la falintaj gefratoj, mortigitaj en la batalado por libereco kaj justo. Dum la mart-tagoj, ĵuras la germana Proletaro, ne ĉesi batali kontraŭ la ekspluatistoj, antaŭ ol estos akirita libereco por ĉiuj ekspluatatoj.



Konata proverbo tekstas, ke marto postulas sangon, kaj de post la naskiĝtago de la germana respubliko (nov. 1918), ĉiujare fluadis laborista sango dum la tagoj de marto. En marto de l' jaro 1919, finis la laboristoj de Berlin siajn januarbatalojn; en 1920, staris la barikadoj de la "Kapp"-ribelo en la tuta regno; en 1921, okazis la luktado en meza Germanio; en 1925, kaŭzis hombuĉadon la bruteca respublika policistaĉaro en la plenigita ĉambrego de la popolparko de Halle, pafante trafe-maltrafe inter la kunvenintojn. Dek laboristoj perdis la vivon kaj 50 estis vundataj. Ĉi tio okazis en "libera" respubliko, kies konstitucio garantias al ĉiu germano rajton disvastigi siajn ideojn per vorto kaj bildo.

Je la 13-a de marto, honoris la Halle'-ana Proletaro siajn mortintajn gefratojn per demonstracio tra la urbo, ĉe kio la policistaro surĉevale denove incitis, engrupiĝante inter la demonstraciantoj. Je la 20-a de marto matene marŝis la Ammendorf-ana Laboristaro al la tombaro de siaj mortigitaj Gek-doj de la "Kapp"-ribelo 1920 kaj 1921. Kaj en la sama tago veturis 10 000 da mez-germanoj proletaj per 60 ŝarĝaŭtomobiloj kun alpendiĝveturiloj kaj flirtantaj ruĝaj standardoj al Merseburg—Leuna—Dürrenberg al la "Leunawerk", kie estis enterigataj aliaj herooj. Ili estis mortigataj bestece de policistoj kaj de enloĝantoj de la malgrandaj kampvilaĝoj, kiuj ne sciis, kio signifas tiu batalo por la libereco. La almarŝo efikis tiel impone sur la vilaĝanojn indiferentajn, ke ili supozis, ke vere jam estas revolucio. Laboristaj delegacioj kun florkronoj kaj ruĝaj standardoj vizitis la tombojn de la mortintaj K-doj en Leuna, Daspig, Gölitsch, Spergau, Keuschberg, Kirch-Fährendorf, Dürrenberg. Dum la tramarŝo de ĉiu vilaĝo, anoncis grupo pri la nombro da K-doj ĉi-tie enterigitaj. Multaj laboristoj ne jam vizitintaj la tombejon, povis vidi kiamaniere kaj en kia angulo (tiu de la memmortigintoj) oni enterigis niajn bravajn K-dojn. En unu tombo kuŝas unu mortinto super la alia. Jen la praktika amo de la servantoj de "Dio"! Speciale en Kröllwitz, la servanto de "Dio" dekretis, ke niaj 5 K-doj enteriĝu en la *ansera herbejo,* kiel taŭgas por krimuloj kaj ne-kristanoj. Kiel signon, ke la Laboristaro ne forgesis siajn fratojn, oni inaŭguraciis monumenton kun la sur-

skribo: *La Leunaj batalantoj. La mezagermania Proletaro. Per batalo al venko.* Super la surskribo troviĝas ruĝa pugno, direktita kontraŭ la "Leunawerk". Unue oni enskulptis la vorton "murditajn", sed ĉar ĉi-vorto kulpigis kaj danĝerigis la ŝtatan potencon, oni devis forigi ĝin. Tamen la idaro sciiĝos, per kiuj niaj K-doj estas mortigitaj.

Ĉi tie sur la ansera herbejo, denove ĵuris la ekspluatataj laboristoj, ne ĉesi batali kontraŭ la ekspluatanta klaso, antaŭ ol estos atingita la celo de ĉiuj subprematoj kaj niaj mortigitaj fratoj estos venĝataj. *(7046.)*



Ankaŭ letero el Sovetio

Kial do fuŝi la faktojn?

Intence mi prisilentis la noton de "Sovetiano" sub la titolo "Ĉu juste?" en "S-ulo" n-o 119—120, kvankam ĝi estis verkita responde al mia artikolo. Mi prisilentis, ne ĉar mi konsentas kun la "teruremo" de la nekonata al mi "Sovetiano", sed ĉar mi opiniis, ke li verkis la noton, ne sciante bone pri la faktoj, kiujn li komunikas.

Sed la nova noto de (evidente la sama) "Sovetiano" en "S-ulo" 127-128, sub la titolo "Letero el Sovetio" jam tiomgrade fuŝas la faktojn, ke oni povas supozi komencon de iu **sistema misinformado** pri Sovetio.

Kaj kontraŭ tio necesas protesti. "S-ulo" devas esti **objektiva** informilo. Kaj la informoj de "Sovetiano" estas bazitaj sur **neĝustaj** faktoj. Tiun neĝustecon mi celas ĉi sube montri.

Por forigi ajnan penson, ke mi elpaŝas pro iu partia fanatikismo aŭ ordono, mi konfesas ke mi **ne** apartenas al iu politika partio kaj ke nenio ĝis nun en Sovetio malhelpis al mi havi mian propran opinion pri ajna afero, tute libere, sen ajna flanka premo, formiĝintan.

Pri la du familioj

1. Mi asertas: nek tiu, nek la alia familio pagas la imposton, ĉar impostata estas nur la salajro, kiu post depreno de kotizoj al sindikato, al interhelpa kaso kaj por vivasekuro superas 100 rublojn. Sekve ne pagas la imposton eĉ tiu k-do, kies salajro estas 100 rubloj, ĉar post depreno nur de sindikata kotizo (2%) kaj interhelpkasa kotizo (½—1%), la resto estas 97 rubloj 50 kop., do malpli ol la impostata minimumo. Kiom granda estas la imposto, oni juĝu laŭ jeno: havante la monatan salajron de 175 rubloj, mi pagas monate 2 rublojn 24 kop. kiel imposton, do malpli ol mi kotizpagas monate al mia sindikato! Jen la "terura" (kiel ĝin nomas "Sovetiano") situacio!

2. La unua familio, havanta 7 infanojn (eĉ se malpli!), pagos por loĝejo malpli, ol la dua, havanta nur unu infanon, ĉar la loĝeja pago estas proporcie malgrandigata (rabatata rilate al la tarifo) konforme al multmembreco de la familio: familioj seninfanaj pagos plenan tarifon, por kelka kvanto da zorgatoj (t. e. nelaborkapablaj — ĉu infanoj, ĉu maljunuloj, ĉu malsanuloj) la tarifo estas malaltigata proporcie.

3. La pago por elektra lumo estos egala por ĉiuj, kaj tio estas bedaŭrinda, ĉar la klasa justeco postulas, ke pago por la komunum-servoj estu proporcia al la laborgajno.

4. Pri lerneja pago mi silentas — mi ne havas infanon kaj tial ne havis la eblon proprasperte konatiĝi kun tiu problemo.

Ĉio ĉi permesas al mi al la demando de "Sovetiano" — Ĉu juste — respondi per demandoj — Ĉu ĝuste? Kial do fuŝi la faktojn?

Post sia aklamo pri "teruro", Sovetiano skribas "Leĝo ĉe ni diras . . ." Kaj mi aserte respondas: **ni ellaboris la leĝon,** kiu diras, ke la edzo kaj la edzino estos memstaraj kaj sendependaj kaj ni zorgas ke tiu leĝo estu efektivigata. Du ekzemploj al tiu aserto:

Vasta amasa diskutado

antaŭiris la akcepton de leĝaro pri la edzeco. La leĝprojekto estis proponata por konfirmo al Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj, sed ĝi prokrastis la akcepton ĝis la leĝprojekto estis vaste pridiskutita en la tuta lando. Nur post tio, konsiderante rezultojn de la diskutado kaj kun konformaj al ĝi ŝanĝoj la leĝprojekto en la pasinta jaro estis konfirmita de l' Centra Ekzekutiva Komitato.

Loĝeja pago kaj elektado al Soveto

En la pasinta jaro okazis ankaŭ larĝa diskuto pri loĝeja pago. Estis multaj projektproponoj flanke de laboristoj pri la maniero kalkuli loĝejpagon. Ankaŭ estis la propono ŝanĝi la nunan sistemon de loĝejo-pago ĝuste tiamaniere kiel ĝin evidente deziras "Sovetiano". Nome: nun la loĝeja pago estas kalkulata laŭ la plej alta salajro de familianoj: se en la familio laboras tri membroj, kiuj havas la salajron 75 rubl., 150 rubl., kaj 45 rubl. do la loĝeja pago estas kalkulata laŭ la tarifo por 150-rubla salajro; oni proponis, ke ĝi estu kalkulata en tiu okazo laŭ la tarifo por 270-rubla salajro, t. e. la sumo de ĉiuj tri salajroj. Fakte, tio estus grava **pligrandigo** de loĝeja pago entute. Ĉu por tio pledas "Sovetiano"?

Kiu estas trompita?

Ĉu oficisto de Sovetio, ĉu "S-ulo" de Sovetiano?

Ĝuste tiel necesos meti la demandon pri la dua noto — "Letero" de "Sovetiano" en "S-ulo" n-o 127-128. Oni ja povas doni la ciferojn ĝuste, kaj oni povas lerte fuŝi la ciferojn, ĵonglante per la faktoj. Kaj "Sovetiano" aperis en sia letero ĝuste kiel ĵonglisto.

Kie, en kiu oficejo de Sovetio oni pagas al oficisto monate nur por 24 tagoj da laboro? Unuafoje mi aŭdas tion, kvankam mi perlaboras miajn vivrimedojn jam dum 15 jaroj, el ili 9 jarojn en la kondiĉoj de soveta reĝimo.

En Sovetio oficistoj estas salajrataj pomonate, sed ne potage. La salajro estas fiksata sendepende de tio, ĉu en iu monato estas 24 aŭ 27 tagoj. La salajron oni pagas dufoje monate — por ĉiu duonmonata (15 aŭ 16) taga periodo.

Ordinare, ĉe la pomonata salajrado la monato estas konsiderata ĉiam 30-taga, sendepende ĉu tio estas 28-taga februaro aŭ 31-taga marto; do salajrataj estas 30 tagoj monate. Sur kio do bazas "Sovetiano" sian aserton, ke nur 24 tagoj estas pagataj al Sovetia oficisto?

Jen sur kio: se iu (oficisto aŭ laboristo—egale; ne ekzistas diferenco rilate salajrosistemon kaj tial tute vane "Sovetiano" parolas precipe pri oficistoj) laboras malpli ol duonmonaton, la pago por tiu periodo estas kalkulata po $^{1}/_{24}$ da monata salajro por ĉiu fakta labortago. Superhora laboro estas pagata ankaŭ el la kalkulo, ke unu horo egalas al $^{1}/_{6}$ da potaga pago, egala al $^{1}/_{24}$ de l' pomonata. Sekve $^{1}/_{24}$ — estas la sistemo kalkuli pagon por periodo malpli granda ol duonmonato.

Nun pri la libertempo: ĉiu oficisto kaj laboristo ĉiujare havas minimume dusemajnan libertempon, kiun li rajtas pasigi kiel li deziras. Ne nur tiu nelabora periodo estas pagata al li, sed eĉ sufiĉe granda elcento havas eblon pasigi la libertempon en ripozdomoj, kie oni estas *senpage* nutrataj, vestataj, loĝigataj, priservataj kaj medicine zorgataj. (En la nuna jaro dumsomere pli ol 200 000 (ducent mil) geoficistoj kaj gelaboristoj povos pasigi la libertempon en ripozdomoj). Ricevante la salajron por plenaj 12 monatoj laborulo laboras 11½ monatojn kaj dum duonmonato ripozas. Se pro iuj kaŭzoj li ne ricevis libertempon, li ricevas apartan pagon por tiu duonmonato, super la ordinara pago por 12 monatoj.

Kiel do agis nia "Sovetiano"? Li prisilentis ĉion ĉi, sed prenis la sistemon de elkalkulo de pago por nelongdaŭraj periodoj ($^{1}/_{24}$ da monata salajro por ĉiu fakta laborpago) kaj renversis ĝin en la aserton, ke oficisto estas pagata nur por 24 tagoj monate . . .

Kion celas la ĵonglado de "Sovetiano"?

"S-ulo" ja ne pagas honorarion por la notoj kaj artikoloj enpresotaj, sekve mankas la instigilo agi ĵurnaliste en niaj vicoj kaj provizi nian gazeton per fantaziaj rakontoj pri Sovetio, kiujn alte taksas kaj bone honorarias burĝa gazetaro.

Mi ripetas: kion do celas "Sovetiano"?

G. Demidjuk.

Sovetlandanoj!

Se vi petas respondon de la Administracio de SAT uzu la laste eldonitajn oficialajn poŝtkartojn de via ŝtato kun respondo.

Novaj impertinentaj postuloj de la bavariaj pastroj

Ĉiu gazetleganto estas sufiĉe informita pri la ega embaraso, en kiu troviĝas la bavaria financa ministro. Mankas al li ĝuste tio, kion li unuavice bezonas por la gvidado de sia ofico, nome mono. Li ricevis de ĉiuj flankoj primokon, tial ke entrepreninte vojaĝon al Berlino cele al helpopeto, li revenis de tie kun malplenaj poŝoj. Mallonge dirite, la traktoj pri la t. n. financa egaligo finiĝis sensukcese por la bavaria registaro, spite ĉiuj kriegadoj de la bavariaj patriotoj. Sed ĉio tio estas indiferenta al niaj pastroj. Ili denove penadas prirabi la popolon, postulante pliajn milionojn da ormarkoj por sia "animsorganta" laboro. La afero estas jena:

En Bavario troviĝas multaj pastroj en la vilaĝoj, kiuj mastrumadas bienojn.



Dum la laboristo rigardas al la ĉielo . . .

Pri la enspezo de tiuj bienoj kaj ankaŭ de la t. n. animprizorga laboro, ili devas ĉiujare sendi finkalkulon al la financa oficejo, por ke tiu povu fiksi la pagendajn impostojn de la koncernaj pastroj kaj la monsumon de la ŝtato pagotan kompletige al pastraj enspezoj. En la jaro 1914 la bavaria ŝtato devis elspezi: por la plialtigo de la pastraj enspezoj — ok milionojn da ormarkoj; por pastraj pensiuloj — proksimume 680 000 markojn. Sed nun la "animzorgantoj" postulis de la parlamento, ke estu aliigata la leĝo pri la kompletigo al la pastraj enspezoj tiamaniere, ke oni de aprilo 1925 por ĉiu jaro, kalkulu tiun enspezon laŭ la bazo ekzistanta en la jaro *1924*.

Kian efikon postsekvigus tio? Nu, en la jaro 1924 estis plej malaltaj la prezoj por la kamparanaj produktaĵoj, sekve de tio ankaŭ la enspezoj de la pastraj bienuloj. Laŭ la eldiro de la ministro por klerigaj aferoj, la aprobo de la pastra propono kaŭzus ŝtatan elspezon por la "animzorgantoj", je 28 milionoj da ormarkoj. Sed tio ne jam sufiĉas al la pastroj. Ili ankaŭ postulis, ke post la kontrolo de la meznombra enspezo de la jaroj 1924-29, oni fiksu dekjaran kalkulperiodon. Notinda ankaŭ estas la sciigo de la ministro Goldenberger, ke multaj pastroj eĉ ne jam ensendis finkalkulon pri la jaroj 1924 kaj la sekvantaj. Ekz. pri la jaro 1924, mankas 19 finkalkuloj, unu de katolika kaj 18 de evangeliaj pastroj. Pri la jaro 1925 mankas 114 katolikaj kaj 356 evangeliaj finkalkuloj.

Mankas mono por forigi la teruran priloĝejan mizeron; mankas mono por plibonigi la staton de la gesenlaboruloj; mankas mono por subteni laŭ bezono la viktimojn kaj posteulojn de la mondmilito, sed tamen ne mankas al la pastraro la impertinenteco, elsuĉi la popolon ĝisoste.

Teksisto (5129).

Postvivantaj komunuloj

La 27-an de marto, la heroa falango de la postvivantoj de la Pariza Komuno — ho ve! pli kaj pli malmultiĝinta! — kun parencoj kaj amikoj, solenis, ĉe frateca matenmanĝo, la datrevenon de la proletara revolucio de la jaro 1871.

Prezidis Camélinat (Kamelina). Civitano Lebey (Lebe), sekretario de la Asocio Frateca de Malnovaj Batalantoj kaj Amikoj de l' Komuno legis leterojn de tiuj, kiuj pro malsano ne povis ĉeesti: Elie Moy (Eli Mua), Rysto (Risto) kaj Adèle Toussaint (Adel Tusen).



Kelkaj veteranoj: Charpentier, Andrieux, Camélinat, Repiquet.

La maljuna K-do Repiquet (Repike) salutis fratece la ĉinajn K-dojn kaj ĉiujn viktimojn de imperialismo. Nia estiminda Camélinat ekkriis: "Mi esperas marŝi kun vi — eĉ ne en la lasta vico — en la proksima komuno". Ĉiuj aplaŭdegis kaj kantis "La Internacio"n, alvokante al tutmonda komuno. K-doj kantis pri la gloroj de la Komuno. Unu el Toulouse (Tuluz) elektis la belajn strofojn de Repiquet, kiu mem kantis: "La Enmarŝo de l' Versajanoj", verkita en 1871. Juna K-dino eksonegis "Kuraĝon, Kamaradoj!" Kaj jun-maljunuloj disiĝis ĉe centfoje ripetitaj krioj:

Vivu la Komuno!

Vivu la libereco de l' Proletaro!

Japano en urba soveto

Laŭ sovetiaj leĝoj, ĉiuj laboruloj, sendiference de nacio, loĝantaj en Sovetio, havas egalan rajton. Tial en nia urba



K-do Takasi Iĉikava

soveto, laboras reprezentantoj de ĉinoj kaj koreanoj loĝantaj en Vladivostok. La urba soveto estas estro de la urba mastrumado, kiu zorgas pri la bonstato de la urbo.

En Vladivostok loĝas kolonio de japanoj. Ili tre ekmiris, kiam oni proponis al ili elekti sian reprezentanton por la urba soveto. Ili eĉ ne sciis kion fari; pro tio, el 100 elektantoj venis al la unua kunveno ne pli ol dek personoj. Oni devis prokrasti la elektadon ĝis okazo de alia kunveno.

La duan kunvenon vizitis sufiĉe multaj personoj kaj oni povis komenci la elektadon. La prezidanto de la kunveno — japano, tralegis instrukcion pri la elektado.

— Ĉu oni povas elekti, kiam ne ĉiuj elektantoj ĉeestas?

— Ĉu la forestantoj ne koleros, se ni elektos ne tiun personon, kiun ili deziras — demandis la ĉeestantoj.

Kiam la demandoj estis responditaj, oni komencis la elektadon. El tri kandidatoj, kiujn proponis la kunvenintoj, la plej multe da voĉoj ricevis K-do *Takasi Iĉakava,* servisto, kiu estis elektata kiel reprezentanto. Tiel, japana reprezentanto eblas bone prizorgi la specialajn bezonojn de la japanaj loĝantoj. *(4112.)*

La moroj de l'eskimoj

La eskimoj ne opinias krimo la mortigon al gepatroj aŭ infanoj...

Per tio mi ne volas diri, ke ili mortigas gepatrojn kaj infanojn amase, ĉar tiuj mortigoj estas esceptaj okazoj. Plej ofte la infanoj kaj nepoj kun granda amo vartas kaj flegas la maljunulojn; sed, se la gepatroj estas invalidaj kaj la infanoj lasas ilin perei, neniu riproĉas pro tio. Same oni ne indignas, se patrino, por sin liberigi de la edukaj zorgoj, sufokas sian novnaskitulon aŭ metas ĝin en la neĝon, por ke ĝi frostiĝu aŭ estu manĝata de vulpoj.

Se malsato minacas la familion, tiam oni oferas la invalidan patron (neniam la patrinon); oni lasas lin sola. Povas okazi, ke ĉasado liveras malmulton aŭ nenion, aŭ ke la besto estas manĝita jam antaŭe sen zorgo pri la estonto. Tiam la maljuna patro, jam ne taŭga por la ĉasado, devas esti lasata sur la glitveturilo, por ne esti ŝarĝo al la familio...

Sed kelkfoje ili eĉ ne atendas la alvenon de la malsato, sed komprenigas simple al la maljuna patro, ke li havas jam malmulte da jaroj por vivi, tial ili devas pereigi lin. Ili ne mortigas lin, sed dum iu neĝventega vetero elportas kaj ĵetas lin de la glitveturilo, por ke la neĝo, frosto kaj vento pereigu lin. Iafoje ili enmasonas lin en la "iglo" (neĝkuirejo) kaj lasas tie kun li manĝaĵojn por kelkaj tagoj.

La infanmortigo estas pli ofta. Se naskiĝas ĝemeloj, unu (unuavice la knabinon) ili senvivigas. La patrino ĉiam havas la rajton, kun la konsento de ŝia edzo, mortigi sian infaneton dum la unuaj 3—4 tagoj post nasko, antaŭ ol ĝi ricevis nomon. Ĉi tiu kutimo havas religian aŭ superstiĉan bazon; la eskimoj kredas, ke la nomo estas vivanta estaĵo, fantomo kiu venĝas la mortigon; sed la sennoma infano ne gravas.

La ĉefa kaŭzo de la mortigoj al infanoj estas la servado de la patrino, precipe somere, kiam la loĝantoj migradas kaj la virino portas ĉiujn objektojn surdorse. Tiaokaze la novnaskito tro ŝarĝas ŝin. Multaj patrinoj pretekstas, ke ili ne havas sufiĉe da lakto por nutri la infaneton. Iel ajn, certe la infanmortigo estas ofta.

La eskima socio tute ne indignas pri tiaj teruraĵoj. La patrinoj malkaŝe diras al ĉiuj siajn farojn, eĉ ŝercas pri ili. Sed ni ne kredu, ke ĉiuj eskiminoj estas same sovaĝaj. Estas patrinoj, kiuj savas la elĵetitajn infanetojn kaj edukas ilin; plue, tiujn, kiuj jam ricevis nomon, ili vartas per plej delikata amo.

La infanojn malofte oni insultas per vortoj kaj neniam batas, ĉar kutime oni baptas ilin je la nomo de iu mortinta parenco, kaj kiu batas la infanon, batas ankaŭ la ree korpiĝintan familianon, kiu la agon povus venĝi.

La seksan hontemon la eskimoj ne konas. Sur la granda fela lito en la "iglo", kuŝas kune la tuta familio kaj gastoj. Ilia leĝo estas la virin-komuneco. La geedziĝo estas nur provizora kontrakto, kiun ofte mallongigas la disiĝo. La amikoj interŝanĝadas siajn edzinojn.

La unika estiminda virto de la eskimoj estas, ke ili ne ŝtelas. Se tamen troviĝus inter ili ŝtelisto, oni lin pelus malproksimen de si. La migrantaj eskimoj ne povas ĉiam, ĉiujn siajn objektojn kunporti; tial ili la nenecesajn amasigas proksime al siaj "iglo"-j, antaŭ ol ili foriras ĉasi aŭ fiŝkapti dum du-tri monatoj. La objektoj estas amasigitaj apud unu el la starantaj glitveturiloj kaj rokŝtonoj kaj la tuto kovrita per feloj de la norda cervo, por ke sovaĝaj bestoj ne tuŝu ilin. La priŝtelo de ĉi tia amasigaĵo estas la plej granda krimo. D. Tennes, kiu plej profunde studadis la morojn de la eskimoj, mencias, ke iu eskimo iufoje ŝtelis el du tiaj "magazenoj" apartenantaj al eminentaj personoj. Post la ŝtelo, tiom turmentis lin la konsciencriproĉoj, ke li pendigis sin kaj lian kadavron oni portis malproksimen kaj elmetis al la manĝemo de la vulpoj. Ankaŭ eskimo ne kuraĝas priŝteli la tombejojn, kvankam la parencoj kaj amikoj entombigas kun la mortintoj ties preferatajn, valorajn objektojn. Stefansson, kvankam dum 20 jaroj vivante inter ili, tamen ne eĉ unu okazon sciis pri ŝtelo inter la eskimoj. Sed laŭ Tennes, ili estimas la propraĵrajton nur de la indiĝenoj kaj, se ili havas okazon, kun trankvila konscienco forprenas la propraĵon de fremdulo.

Kvankam estas multe da ekzemploj pri la sovaĝeco de la eskimoj, tamen okaze ili povas tre facile mildiĝi. Se iu rakontas plorante, ke li perdis sian amikon, la tuta aŭskultantaro eklarmas kaj kun veadoj ekploras. Sed tio ne malhelpas al ili, ke post kelkaj minutoj ili ridas pro ia bona ŝerco! Ili havas sufiĉe da kompreno pri humoro kaj longe povas ridadi pri preskaŭ nenio. Krome, ili havas guston por la arto, precipe por la desegno.

Iliajn morojn kaj kutimojn karakterizas la primitiveco, kaj la rigora klimato ne ebligas al ili ellerni la kutimojn kaj pensmanierojn de la plene civilizita homo.

Trad. el la "Hungara Naturscienca Revuo"
Beta.



SENMORTECO

(Anstataŭ recenzo)

Mi finlegis la libron: "Je la Nomo de l' Vivo", de nia K-do *E. Izgur* kaj deziras, ke ĝi estu tradukata en la naciajn lingvojn, ĉar bedaŭrinde ĝis nun malgranda elcento da homoj scipovas esperanton.

Mi deziras tion, ĉar jam delonge mi samkredas kiel la aŭtoro kaj ŝatus, ke aliuj ankaŭ samkredu. Mi ofte rimarketis rilate ĉi-tiun kredon, malgrandajn pajlerojn, kiuj montras la direkton de l' vento; sed neniam antaŭe mi renkontis ampleksan verkon pri la temo de senmorteco. Estis ja, antaŭ kelka tempo, usonanino, "novpens"-ulino, kiu asertis, ke ŝi ne mortos. Ŝi tamen fine mortis, sed tiu fakto ne senigas min je mia kredo. Ĉu arto ja ne estas longa penado? ĉu io grandskale atinginda iam tuj efektiviĝis? Ankaŭ ĉu estus dezirinda afero, ke la plejmulto el la tergloba loĝantaro nuntempa eterniĝu? Ni devas multege labori por fari el ĉi-mondo taŭgan lokon por enteni senmortulojn. Ĉiam revoluciema ideo *antaŭas* la necesajn kondiĉojn por efektivigi la deziratan ŝanĝon, sed tiu ideo, ĉar pensoj estas laborantaj fortoj, disvastiĝas kaj, iom post iom, la necesaj kondiĉoj estiĝas.

La lertega Leonardo da Vinĉi *ne* sukcesis flugi; nuntempe ĉiu stultulo povas trairi la ĉielon. Jen la sennaciisma ideo ĉe SAT-anoj, kiam ankoraŭ ekzistas popoloj ne jam atingintaj sian naciecon. Socialismo ne estas plene starigita ie, sed malgraŭ tio, multaj antaŭvidas eĉ pli noblan staton, la staton de anarĥio. Mi kredas, ke *ĉion* alsopiritan de l' homaro, estas atingebla. Ni povas vidi la sopiradon al senmorteco tra la jarcentoj; sed tiu sopirado ne kuraĝis memstare fortiĝi; ĝi sin apogis sur la mensogajn eklezioj, kiuj por sia profito kastris mirindan ideon kaj uzis ĝin kiel eŭnukon por zorgi siajn riĉaĵojn. Do, unue, ĉe ĉi-tiu afero, same kiel en okazo de Leonardo, estiĝis malsukceso, pro manko de sufiĉa scienco. Ne gravas; ni provu kaj penu denove.

Plue, mi ŝatus legi diskutojn pri la tezo de senmorteco sur la paĝoj de *Sennaciulo* kaj (aŭ) de *Sennacieca Revuo*. Ŝajnas al mi ke nur tiuj, kiuj akceptis kaj propagandas tian revolucieman tezon, kia estas sennaciismo, indas esti la unuaj, kiuj akceptos kaj propagandos la milfoje pli revolucieman kredon je senmorteco.

Mi ankaŭ kuraĝas diri, ke mi ŝatus en nia gazetaro vidi daŭran aŭ intermitan rubrikon pri ĉi-tiu temo, ĉefe pri ĝia *praktika flanko*, sen kiu la teorio estas nur sensuka trunko. Ni havas, mi kredas, inter niaj vicoj, scienculojn kaj tiujn, kiuj interrilatas kun scienculoj; ili do sendu ĉian informon pri la lastaj eltrovoj de la scienc-laborantoj en ilia serĉado de la fonto de l' vivo, pri la freŝdataj sukcesoj en resanigo kaj, pli grave, malhelpo al malsaniĝo. Ni legu ankaŭ informojn pri tiuj, kies vivo daŭris eksterordinare longe; ĉu ni ne ĉiuj konis aŭ aŭdis pri personoj, kiuj mortis *per grandaĝeco* post 80 aŭ 90 jaroj, dum aliaj preterpasis jarcenton per kvaronjarcento aŭ eĉ pli? Ni penu eltrovi la kaŭzon de ĉi-tiu diferenco. Ni diskutu pri la vivado en la estontaj senmortecaj tagoj. Ni plenigu la rubrikon kiom eble per esperplenaj pensoj kaj faktoj, sed neniam malatentantaj veron kaj racion; estu publikigita ĉiu dubo, ŝanceliĝo aŭ plena kontraŭo; neniam io valora profitas finanalize, per kaŝemo aŭ subpremo al alia vidpunkto. Ĉar mi kredas je la tezo, mi kredas ankaŭ je la eblo fine kredigi aliajn pri ĝi kaj je ĝia bona efiko eĉ en la nuna mortema tempo. La ideo pri senmorteco estas fortiga ideo, saniga por malsanuloj, ĝojiga por malgajuloj, esperiga por dubemuloj.

Ne laborista temo? Kial ne? Ĉu laboristoj ne estas homoj; ĉu ni ja ne kredas, ke la laborista klaso havas la historian mision puŝi antaŭen la homaron? Do, inter ni ankaŭ troviĝu tiuj, kiuj kapablas vidi en la malproksiman estontecon, kiam homoj indos senmortecon.

E. K. L.

TRA ESPERANTIO

KELKAJ RIMARKOJ PRI MALPROPORCIO EN NIA MOVADO

Jam depost kelka tempo oni povas konstati en nia SAT-movado maltrankviligan fakton: gravan malproporcion en la evoluritmo de la laborista movado esperantista *en* Sovetio kaj *ekster* Sovetio.

Sufiĉas preni la jarkolekton de "S-ulo" de 1926 kaj ekrigardi sur la korespondrubrikon. Korespondemuloj el Sovetio multe pli ofte sin anoncas ol el iu alia lando. Ankaŭ el Germanio ni trovas anoncintojn en pli forta proporcio, sed tamen, kelkfoje oni havas preskaŭ la impreson, ke la nombro de Sovetianoj korespondavidaj estas pli alta ol tiu de ĉiuj korespondemuloj alilandaj kune. La fakto, ke la sovetia esperantista movado kreskas pli rapide ol tiu de aliaj landoj esprimiĝas cetere per konstantaj plendoj de sovetlandaj kaj nesovetlandaj K-doj pri tio, ke nia organo enhavas tro multe da artikoloj el kaj pri Sovetio, tro malmulte el aliaj landoj. La nombro de la Sovetiaj esperantistoj rapidege kreskas: kursoj okazas ĉiuloke, en sindikatoj, inter la junularo ktp. Precipe la disvastigo de esperanto inter la junularo al ni permesas antaŭvidi, ke la kresko de nia movado en la proksima estonto ankoraŭ pli intensiĝos.

Tiu rapida kresko ne estas surpriziga: la esperantista movado en Sovetio ĝuas koincidon de speciale favoraj cirkonstancoj, kiuj ne ekzistas en aliaj ŝtatoj. La foresto de "neŭtrala" (= burĝa) esperanto-movado malebligas disigon de fortoj kaj devigas ĉiujn proletajn elementojn partopreni la laboron en SEU, dum en aliaj landoj ni trovas multe da proletoj ankoraŭ en "neŭtralaj" organizoj. La energioj de laboruloj alilandaj grandparte fluas sur la politikan kampon, kie ili devas batali kontraŭ la regantaj klasoj, kontraŭ malhelpaĵoj kreataj de la klasa malamiko. En Sovetio ne plu necesas batali kontraŭ burĝa regno, kontraŭ kapitalista premo: la ĉefa *politika* tasko troviĝas sur *ekonomia* kaj *kultura* kampoj. La kultura laboro estas unu el la ĉefaj taskoj de la Proletaro en Sovetio, la tempo disponebla por instruado, lernado, ktp. estas pli granda ol en kapitalistaj ŝtatoj, kie cetere la ofta neapliko de la okhora labortago malpliigas ankoraŭ pli la liberan tempospacon.

Krom tio oni devas memori pri la vigla subteno donata de la ŝtataj, sindikataj, partiaj kaj komjunulaj organoj al la esperantista movado. Ankaŭ la tuta eduksistemo en Sovetio ludas gravan rolon. Dum en la burĝa mondo, la lernejoj estas koviloj de plej infama ŝovinismo, kontraŭ kiuj la laboristaj organizoj batalas sub tre malfavoraj kondiĉoj, ne povantaj influi la junularon en internacia senco same vaste kiel la burĝaj lernejoj kaj naciaj junularorganizoj, la edukado en internacia spirito estas la ĉefa leĝo en la sovetiaj lernejoj. En burĝaj landoj, la internacia influo de proletaj organizoj kolizias kontraŭ la ŝovinista influo de la oficialaj edukinstitutoj. En Sovetio, oficiala edukado de la ŝtato kaj edukado de la proletaj organizoj agas samdirekte: sur bazo de internaciismo. Tiel la emo al interrilato kun laboruloj alilandaj, al konstanta kontakto kun ili, estas pli forta en Sovetio. La sovetlanda Laborularo tre bone scias, ke ĝia sorto estas mallarĝe kunligita kun la destino de la proleta movado internacia.

Ĉiuj tiuj faktoroj kaŭzas rapidan kreskon de la esperantista movado sovetia. Kvankam tio estas tre ĝojiga fakto, ĝi min maltrankviligas...

Se tiu malproporcio en evoluritmo de la laborista esperanto-movado en kaj ekster Sovetio daŭros, ĝi havos ĉagrenigan influon sur la esperanto-movadon en la sovetaj landoj. Fariĝos pli kaj pli malfacile por la sovetiaj esperantistoj, trovi korespondantojn en eksterlando. Ĉar la laboruloj de Moskvo ja lernas esperanton ne por korespondi kun esperantistoj de Leningrad aŭ de Vladivostok. Por tio sufiĉas scii rusan lingvon, ili ne bezonas perdi sian tempon por studi esperanton.

Oni povus respondi, ke en Sovetio ekzistas multe da nacioj, ke sekve la korespondemuloj uzu esperanton en rilatoj kun alilingvaj sovetianoj, se la nombro da ekstersovetiaj korespondantoj ne sufiĉas. Sed estas konate, ke el ĉiuj loĝantoj de Sovetio oni trovas precipe inter la rusoj industriajn proletojn, ke la plejparto el la aliaj nacioj de Sovetio estas kamparanoj. Ĝenerale, kamparano ne havas ian intereson por esperanto, ĉar li ne estas sufiĉe interesata kaj ne rekte tuŝata per internaciaj ligiloj. Esperanto ja estas produktaĵo de la moderna socio, de la granda industrio, kiu venkas spacon kaj tempon kaj faras de la tuta tero unu solan ekonomiteritorion.

Certe, la aliaj nacioj de Sovetio ankaŭ bezonos esperanton, sed la proceso de ilia internaciiĝo estas nur ĉe sia komenco kaj ne donos rezultojn por tre baldaŭa tempo.

Pro tio, la malproporcio inter Sovetio kaj la aliaj landoj enhavas la danĝeron, ke en Sovetio stariĝos tro multe da esperantistoj kompare al la korespondkapablo ekster Sovetio. Tiuj esperantistoj trovos, ke ili lernis esperanton senutile. La disvastigo de esperanto tiam povos suferi.

Per tiuj rimarkoj, mi intencas averti la K-dojn ekstersovetiajn, por ke ili rekonu tiun eblan danĝeron kaj faru ĉion por ĝin kontraŭbatali. Certe, tia danĝero ne estas mortiga: ĝi elfluas el kresko kaj ne el senmoveco aŭ malkresko de la movado. Sed necesas ĝin vidi ĝustatempe kaj antaŭprepari kontraŭrimedojn. *L. Revo.*

LA RABISTOJ

Dramo en kvin aktoj de Schiller

Unu volumo in-8, 114-paĝa.
Prezo: 1.20 mk. g.

La Rabistoj estas la unua dramo publikigita de la fama germana verkisto Schiller. Ĝi aperis en la jaro 1781. Legante tiun tradukon "ni denove kaj profunde sentas, ke la lingvo de Zamenhof ne estas ia senviva ligita aŭtomato, kies ĉiuj movoj estas fikse antaŭregulitaj de ia logikema mekanikisto". (Carlo Bourlet.)

Havebla ĉe Administracio de SAT.

VII-a Kongreso de SAT

Lyon (Francio)

12.—16. aŭgusto 1927

3-a Komuniko

Kongresejo. — *La Kongreso okazos en la salonego "Emile Zola" de kooperativo "L'Unitaire", 127, rue Boileau,* Lyon *VI.*

Kongreskomitato. — *Prezidanto: K-do* Marcel Roux, *90 rue Boileau,* Lyon *VI (Francio), al kiu oni sendu aliĝilojn, leterojn, monon ktp.*

Kotizo. — *Egala je SAT-kotizo, sed ni dankeme akceptos plian monon, kiun bonvolos donaci aliĝintoj por helpi al bona aranĝo de la Kongreso.*

Pago. — *Per naciaj biletoj aŭ ĉeko en registrita letero. Francianoj prefere pagu al la kongreskasisto: K-do* Leon Chaussade, *64 rue des Macchabées,* Lyon *V (Chèque postal* Lyon *7521).*

Nur estos publikigata la nomo de K-doj kies kotizon la komitato estos enkasiĝinta; ni konfirmas, ke nur al ĝi devas esti senpere pagataj la kotizoj. Bonvole simpligi la jam sufiĉe gravan laboron de l' organizantoj, konformiĝante al komitatavizoj.

2-a Listo de aliĝintoj:

31.	K-dino	C. Monteil, Lyon	5362
32.	K-do	H. Joerg, Lyon	4718
33.	„	H. Pédrini, Lyon	1210
34.	„	J. Desmoulières, Marseille	5293
35.	„	E. Ferrero, Marseille	5887
36.	„	R. Torras, Marseille	922
37.	„	E. Tournel, Marseille	1255
38.	„	J. Turcan, Marseille	522
39.	„	I. Moscallegra, Marseille	8107
40.	„	M. Boubou, Orleans	518
41.	K-dino	G. Boubou, Orleans	4232
42.	K-do	M. Valluet, Orleans	5822
43.	„	P. Michel, St. Georges de Reneins	
44.	„	M. Salzmann, Strasbourg	—
45.	„	F. Berbet, Lyon	6308
46.	K-dino	A. Pompanon, Lyon	5360
47.	K-do	E. Françon, Villeurbanne	5417
48.	„	J. Coll, Grenoble	7997
49.	„	J. Rival, St. Etienne	126
50.	K-dino	L. Jourdan, St. Etienne	459
51.	K-do	A. Bonnet, St. Etienne	492
52.	„	J. Roth, Frankfurt a/M.	130
53.	„	W. Sterzenbach, Essen	4567
54.	„	J. Combe, Rive-de-Gier	3997
55.	„	J. Gracia, Colombelles	6190
56.	„	G. Buna, Düsseldorf	3789

Eldonaĵoj. — *La komitato eldonis serion da 20 belegaj poŝtkartoj kun esperanta teksto kaj reklamo pri la VII-a Kongreso. Prezo afranke: 4 fr. fr. (por francianoj: 3 fr. 25).*

Salutvespero. — *Ĝi okazos vendredon 12-an de aŭgusto. Jam ni petas alvenontojn, lertaj je kantado de esperanta repertuaro, informi nin pri sia konsento partopreni la festan parton de la salutvespero.*

Propaganda kunveno. — *Por impone fermi la kongreson, kunveno estos orga-*

1.70
34

nizata mardon 16-an de aŭgusto, vespere. Ni alvokas SAT-anojn-oratorojn partoprenantaj la kongreson, ke ili skribu jam pri tio al la komitato. K-doj paroladantaj devos pritrakti batalon de sialanda Proletaro kaj ĝian agadon por liberiĝo el kapitalisma potenco.

SAT-kongreso estas ĉies prizorgendaĵo; se ĉiuj K-doj priparolos nian Asocion en antaŭenemaj organizoj, presigos en laboristaj gazetoj notojn aŭ artikolojn pri la VII-a kaj ĉiel celos profiti la 40-an datrevenon de nia lingvo por plidisvastigi ĝin en tutmonda Proletaro, tiel ili helpos la organizantojn de la VII-a Kongreso sukcesigi la komunan entreprenon.

Estas dezirinde, ke la VII-a aspektu kiel vera kunveno de laboristaj delegatoj; ĉiu kongresano venu kiel rajtigito de sia sindikato, komunista ĉelo, socialista aŭ liberecana grupo, kooperativo, sekcio de I. R. H. aŭ de I. L. H., liberpensula aŭ sporta societo k. c., kiu, post la VII-a raportos en sia respektiva organizo pri la laboro kaj la decidoj de la Kongreso. Tiel SAT-anoj estos konsiderataj de laboristaj gvidantoj, ne kiel kongresamuzemuloj, sed kiel proletaj agitantoj por definitiva liberigo de l' Proletaro.

Komisiite de l' kongres-komitato,
La Prezidanto: M. Roux.

*

NOVA GRANDA SUKCESO

Okaze de 9-jara datreveno de Ruĝarmeo, ruĝarmeana sekcio de Centra SEU-Komitato sendis grandan artikolon, pri uzado de esperanto en Ruĝarmeo, al redakcio de "Pravda" — ĉeforgano de rusa kompartio. La artikolego aperis en jubilea n-o de "Pravda".

Samtempe alia artikolo pri la sama temo estis dissendita de PUR (Ĉefa Politikoficejo de Ruĝarmeo) en sia bulteno al ĉiuj ĵurnaloj de USSR kaj aperis en 57 ĵurnaloj.

Post tio-ĉi, redakcio de "Pravda" mem sin turnis al SEU-militsekcio kun peto aranĝi per esperanto korespondadon de siaj ruĝarmeanoj-korespondantoj kun eksterlanda Laboristaro. La sukceso estas des pli grava, ke ĝis nun "Pravda" tute sin detenis de esperanto kaj pro tio influis aliajn ĵurnalojn de Sovetio. *5241*

Jubileo-Ĉeno[1]

Schürrer (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **SAT-rondeto** (Landshut i. B.) 1,50 mk. g., alvokas SAT-rondon en Mühldorf i. B. **SAT-grupo** (Smolensk) 15 rubl. k. esperas, ke aliaj SAT-grupoj de la tuta mondo faros la samon. Samtempe ni alvokas SAT-grupojn en Tver, Gomel k. Minsk pagi la saman sumon. **Zaĥariĉev** (Niĵni-Novgorod) 1 rubl. laŭ alvoko de Piskunov kaj invitas Aleksandrov, Fedjancev, Ŝirokov, Baranov, Babina k. Stepanov (Niĵni-Novgorod). **Konovalov** (Niĵni-Novgorod) 1 rubl. laŭ invito de Kalaŝnikov k. Bogdanov, alvokas Kalaŝnikov, alpagi al lia ĉenero pli grandan sumon, k. Gek-dojn Adamson (Göteborg) M. Starr (London), P. Nixdorf (Herne), Aas (Oslo), Semjonova (Leningrad). **Kalaŝnikov** (Niĵni-Novgorod) 1 rubl., invitas Konovalov, Leontenkov, Piskunov, Vinogradov (Niĵni-Novgorod), Alalikin (Vjatka) kaj ĉiujn aliajn invititajn de li en "Senn"., ĉu ili jam pagis aŭ ne, alpagi al pagita de li ĉenero 1,50 rubl., krom tio invitas Tondok (Weissenfels), Scheel (Stuttgart-Untertürkheim), Lieniger (Leipzig), Endler (Selb), Möhle (Görlitz), Avid (Coursan-Aude), Andersson (Göteborg), Matejovsky (Preŝov).

El Irkutsk enĉenigas 8 rubl.: **Babiĉev-fratoj, Filipov, Makzurjev, Ignatjev patro k. filino, Lobanoviĉ k. Poluŝin** (hontigita de Ŝtercenbaĥ el Essen) po 50 kop.; **Krjukov, Rukavicin, Simeonov k. Solovjov** po 1 rubl. Samon faru: fervorulino Ĉilton (London), Ŝevcugov, Petrov, Ĥoves (Novosibirsk), Malvarmiĝanta Fiŝer k. skeptikema akademiano Marr (Leningrad), Ĥain Ĥirva (Mongolio), SAT-anoj de Ĉito ĝis nun studantaj abocon de Sennaciismo (Sibirio). — **W. Enghardt** (Leipzig) 2 mk. g. laŭ alvoko de sia frato en Nadeĵdinsk, alvokas la Vjatka'an bankoficistaron — esperantistaj k. neesperantistaj.

K-do **Salvadó** (Parizo) 10 fr. fr. alvokas Ral, Suringad, Morell (Barcelono) kaj Mataŝin (Berlino). **Esp. Labor. Grupo** (Lyon) 25 f. f., alvokas pli riĉajn grupojn en Paris, St. Etienne, Marseille, k. a. dediĉi parton el sia kasenhavo al SAT-kaso. **Golubcov** (Koskolovo) 0,50 rubl.; **Neumann** (Essen) 1,50 mk. g.; **E. Földi** (Budapest) 3 pengoj, alvokas K-dojn Kuĉinski (Ĉita), Bogdanov (Veliĵ), Evans (Huyton) k. c. konatulojn. **Fiale** (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **SAT-grupo** (Saint Etienne) 2,50 fr. fr.; **O. Günther** (Schwoitzsch) 1 mk. g., alvokas Ĉeĥoviĉ (Kiev). **Skugarevskij** (Kazan) 0.75 rubl.; **Melzer** (Waltersdorf) 2 mk. g.; **Ŝuh** (Neumer) 20 kr. ĉek. laŭ alvoko de Schweinfurter.

[1]) Vidu n-on 100 de "S-ulo".

AL SAT-ANOJ SKRIB- AŬ BANK-OFICISTOJ

Kongreso de Francia Federacio de Skrib- kaj bank-oficistoj (sekcio de Internacia Ruĝa Internacio) okazos en Lyon, de 14 ĝis 16 de aŭgusto 1927.

Ĉar reprezentantoj de estraro de ĉi gravá organizo ĉeestos la VII-an SAT-Kongreson ni alvokas ĉiujn samprofesiajn SAT-anojn sendi, nome de sia sindikato, salutleteron en esperanto al sidejo, kies adreson ni sciigos pli poste. Kaj ni precipe insistas jam por ke kongresanoj-oficistoj venu en Lyon kun rajtigilo de sia loka, distrikta aŭ nacia sindikato.

La kongresorganizantoj kaj ĉiuj oficistoj ĝojos akcepti fremdajn kolegojn. Plie, estas kore invitataj eĉ alitendencaj oficistoj, ĉar demando pri sindikat-unueco kuŝos en la tagordo de la kongreso. Ĉiutendencaj SAT-anoj-oficistoj vizitu nian Federacian kongreson.

SAT-anoj *132* kaj *4622* (estraranoj de Lyona sindikato).

*

Ĉu kamaradece? Ĉu SAT-anece?

Leningradaj SAT-anoj, respondu! Pri ŝuldo de Leningrada Gubernia Komitato de SEU al iu Berlina Esperanto-Eldonejo — je sumo de 80 rubloj por kredite ricevita literaturo, ŝuldo ĝis nun ne pagita, mi skribis al K-do Teterin (SAT-ano 1473, 19. XI. 26), Urban (5089 — 9. XII. 26), Podkaminer (1679 — 12. XII. 26), Koĉkin (3370 — 12. XII. 26), Piĉaĥĉi (3814 — 9. I. 27, rekomendita p. K.), ĉiuj aŭ sekretario, aŭ Komitatanoj, aŭ membroj de Leningrada Gub. organizaĵo de SEU.

Eĉ ne unu respondon mi ricevis, kaj same la kreditoro. 10. III. 1927.
Antaŭa sekretario de Leningrada Gubkom SEU.
H. Frank (2144).
Motoviliĥa. Permskogo okruga. Solikamskij trakt n-o 5.

*

NEKROLOGO

Antaŭ du semajnoj mortis pro ftizo unu el la plej malnovaj Kievaj esperantistoj kaj SAT-anoj, K-do *Efimo Korecki (3723).*

Honoron al lia memoro!

Kiev, 23-a marto 1927. *Kieva SAT-anaro.*

*

KRONIKO

Ĉekoslovakio.

Ĉeske Budejovice. — Esp-klubo "La Progreso" aranĝis dec. 5, Zamenhofan memorfeston k. dec. 11, propag. kunvenon kun kolorlumbildoj en la sindikata domo. Parolis K-do Pech, instigante ĉeestantaron lerni esp-on, kiel helpilon por proletaraj celoj. Mart. 3 aranĝiĝis vespero kun kolorlumbildoj. (Pro malklara skribmaniero de l' raportinto, ni ne komprenis entute la senditaĵon!)

Francio.

Aubenas. — 12.3. okazis propag. kunveno organizita de "Rodana Grupo" (ampleksanta distriktojn Drôme k. Ardèche). Ĉeestis pli ol 100 pers. K-do *132* pritraktis temon de nia movado: Esp-o k. Laboristaro. Kelkaj komĉelanoj enskribiĝis por kurso. *L. M.*

Grenoble. — Nia movado prosperas, K-doj fariĝante pli k. pli agemaj. Kurso en Esp. Lab. Grupo ĉiam bone funkcias. K-do *Coll* gvidas kurson en hispana grupo "Sociedad Cultural Prometeo". *P. R.*

Lyon. — 16-3-27 okazis propag. kunveno organizita de Esp. Lab. Grupo. Ĉeestis 70 pers. Paroladis K-do *132,* montrante, ke lab. k. esp. movadoj estas solidaraj unu kun alia. Kurso malfermiĝis 17-3-27, gvid. K-do *Arnaud,* (24 lern.). Kiel pasiva membro de SAT., Esp. Lab. Grupo estas la plej bona varbanto por nia asocio. Dum 1926 nia librofako vendis 2000 fr. da esp.-aĵoj. Dum la tri unuaj monatoj de ĉi-jaro, ni atingis preskaŭ la duonon de tiu sumo. Ĉi-tie lab. gvidantoj k. amasoj tre interesiĝas pri nia afero.
Grupestraro.

Romans. — 26. 2. 27 okazis familia vespero organizita de Esp. Lab. Grupo. En la koncerto estis esp-kantoj. K-do Bernizet paroladetis pri nia lingvo. Bonaj rezultoj. *(7996.)*

Litovio.

Ŝiauliai. — Lastatempe en la tie-ĉi malfermiĝinta Popola Universitato, esp-o estas instruata de *M. Zakaŝansky.*
Mozeo Zakaŝanski.

Sovetio.

Erivan. — Funkcias 2 kursoj, ĉe la lab. lernejo je l' nomo de K-do *Dzerjinskij* (gvid. K-do *G. Sevak)* k. ĉe la Domo de Kulturo (gvid. K-do *Ohanĝanjan).* Elektiĝis nova estraro de Armenia Esp. Unuiĝo. La prez. estas K-do *Jerznkjan* (Popola Komisaro de Terkulturado de Armenio); sekr., K-do *G. Sevak* (membro de CK, SEU). Armenia Oficejo de SEU preparas la eldonon de lerno-libro. Popola Komisario de Klerigado de Armenio (post la raporto de K-do *G. Sevak)* faris favoran decidon, permesante aranĝon en ĉiuj superaj k. pli altaj lernejoj, de esp-kurso.

Novoĉerkassk. — 13-3-27 okazis propag. vespero k. ekspozicio en "ruĝa anguleto" de la Politeknikumo. Ĉeestis 60 pers. Legis

K-do *Bokarjov* de Rostov-Don, pri nuna stato de esp-movado en USSR. k. alilande. Aliaj K-doj partoprenis en diskutado k. deklamado. Sukcesa vespero. En la urbo funkcias rondeto ĉe Industri-Ekonomia Teknikumo. Pro la proks. fino de lernjaro en ĉiuj lerninstitucioj de l' urbo, la komitato decidis, komenci kursojn nur aŭtune k. utiligi printemp-someron por 1. likvidi analfabetecon esp-an de l' organizanoj, 2. kunligi lab. organizojn kun eksterlando. *N. Fedotov (3736)*

Novosibirsk. — Spite malbonaj kondiĉoj, ni komencis lerni esp-on en dec. Post 11 lecionoj, ni povas legi, skribi k. iom paroli k. interkompreni. Ni skribis 2 leterojn kiujn ni sendis en 11 landojn kun 21 desegnaĵoj niaj; ricevis 4 respondojn k. el Ĉekosl. 7 desegnaĵojn. Ni komencis kanti 4 esp-kantojn. Ni sentas, ke esp-o estas viva lingvo, kapabla ligi nin kun alilandanoj. *N. A. Ponomarev.*

Vladivostok. — Krom SAT-grupo en nia urbo, laboras esp-rondeto ĉe "Osrovskij" klubo de Sovet-Servistoj. En feb. finiĝis dua esp-kurso, malfermita de l' rondeto en okt. Finlernintoj praktike perfektiĝis. Ili korespondas kun alilanduloj k. partoprenas en buŝfolietoj (?). Dum la buŝfolietoj, la partoprenantoj rakontas versaĵojn, anekdotojn ktp. Antaŭnelonge nin vizitis germ. SAT-ano, K-do *Börschel H.*, partopreninto de la VI-a. Li gastis en nia urbo 12 tagojn k. forveturis hejmen per germ. vaporŝipo. *(4112)*

Zavitaja. — Esp-ondo ĝisrulis ĉi-tien en 1926 j. kun alveturo de K-do *Sostavzin* kiu organizis esp-rondetojn el labor- k. oficistoj. Nuntempe estas ĉi-tie 10 SEU-anoj k. lernas esp-on en sepjara lernejo 40 gelern. En lokan ŝakan rondeton iras niaj esp-istoj. Aperas murgazeto "Informilo pri esp-movado". Ni korespondadas kun eksterlandanoj. En loka "Libra afero" estas vendataj esp-lernlibroj k. literaturo. *T. Tirin.*

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo".

Bolŝevistskaja Smena, Rostov, 15-3-27: "Blankaj mastroj — flavaj sklavoj" (119). — *Finnmark Fremtid,* Vardo, 22-3-27: "El Sibirio" (127—128).

Enhavas notojn pri SAT.

Bulletin d-Information de l' I.T.F., Amsterdam, mar. 1927: cito pri la 13 landoj el kiuj venis la artikoloj en kuranta n-ro de "S-ulo" k. laŭdo pri ties utilo. — *El Socialisto,* Madrid, 22-3-27: artikolo de K-do Azorin, priparolanta VII-an SAT-kongreson k. sciiganta pri konkurso pri modelo por SAT-p-karton (imitinde!). — *Kremenĉugskij Raboĉij,* 24-3-27. — *The Daily Herald,* London, 1-4-27: en Notoj de K-do Mark Starr, pri-skribo de l' SAT-eldonaĵo "Ruĝo kaj Blanko". —

Enhavas tradukojn el esperantaj leteroj.

Molodij Bilŝovik, Kiev, 20-3-27 (2). — *Zvezda,* Perm, 4-1-27, 9-3-27. — *Molot,* Rostov, 23-2-27. — *La Mir i Trud,* Rostov, 23-2-27. — *Narodni Dnevnik,* Ljubljana (Jugosl.), 18-12-26. — *Kremenĉugskij Raboĉij,* 25-3-27. — *Raboĉij Putj,* Smolensk, de 16-1 ĝis 25-3-27 (35). — *Tovarišĉ,* Vjazma, dum sama tempo (2). — *Smolenskaja Derevnja,* dum sama tempo (9). — *Junij Tovarišĉ,* Smolensk, dum sama tempo (5). — *Krasnoarmejskaja Pravda,* Smolensk, dum sama tempo (34). — *Krasnaja Svezda* (ĉeforg. de Ruĝarmeo), (6). — *Izvestija VCIK* (ĉeforg. de Sovet-registaro), (1). — *Krasnij Gornjak,* Krivoj-Rog (5). — *Do novogo sela,* Krivoj-Rog (2). — *Krasnaja Armija,* Harkov (1). — *Krasnaja Zvezda,* Leningrad (1). —

Enhavas Materialon de SAT-Gazetservo.

Molot, Rostov, 8-2-27, 8-3-27. — *Zvezda,* Perm, 8-3-27. — *Raboĉij Putj,* Smolensk, de 16-1 ĝis 25-3-27: 4 notoj. — *Smolenskaja Derevnja,* dum sama tempo: 2 notoj. — *Junij Tovarišĉ,* Smolensk, dum sama tempo: 3 notoj. — *Krasnoarmejskaja Pravda,* Smolensk: 2 notoj. — *Do novogo sela,* Krivoj-Rog: 2 notoj. —

Enhavas priesperantajn artikolojn.

Kremenĉugskij Raboĉij, Kremenĉug, 17-3-27: alvoko de l' redakcio k. leciono; 25-3-27. — *Bulletin d'Information de l' I.T.F.,* Amsterdam, mar. 1927. — *Putj Rabselkora,* Rostov, 15-2-27, 28-2-27. — *Sächsische Arbeiter Zeitung,* Leipzig, 19-3-27. — *Raboĉij Putj,* Smolensk 16-1 ĝis 25-3-27; 13 artikoloj k. notoj. — *Smolenskaja Derevnja,* dum sama tempo; 3 notoj. — *Krasnoarmejskaja Pravda,* Smolensk, dum sama tempo; 2 notoj. — *Krasnaja Zvezda* (ĉeforg. de Ruĝarmeo); 3 artikoloj k. notoj. — *Pravda* (ĉeforg. de Sovetia Kompartio); 2 artikoloj k. notoj. — *Trud, Klinci;* 1 artikolo. — *Komsomolskaja Pravda* (ĉeforg. de Sovetia Komjunularo); 1 artikolo. — *Krasnoarmejskaja Svedza,* Novosibirsk; 2 artikoloj. — *Krasnij Voin,* Moskvo. — *Krasnij Voin,* Tiflis. — *Krasnoarmejec,* Moskvo. — *Krasnoarmejec,* Samara. — *Krasnaja Zvezda,* Leningrad. — *The Daily Herald,* London, 1-4-27. — *La Revista Blanca,* Barcelona, N-ro 93. —

Sennacieca Revuo aperos kiel duobla n-ro marto—aprilo.

*

KOREKTO

En la artikolo de A. Tomo "Lenin pri sennaciismo" ("S-ulo", n-o 129-130) oni petas korekti jenan gravan preseraron: en la linio 30-a desupre legu anstataŭ "kunproksimiĝo"-"kunfluiĝo" kaj en la 31-a anst. "kunfluiĝo" legu "kunproksimiĝo".

*

La Lingva Angulo

Demando:

En "S-ulo" mi ofte legas "POTAGE, POSEMAJNE, POMONATE". Ĉu tio estas ĝusta? ĉu Zamenhof iam uzis PO tiel? (164).

Respondo:

La uzado de la prepozicio PO kiel prefikso estas korekta, 1. ĉar Z. uzis ĝin tiele; 2. ĉar "ni havas plenan kaj nelimigitan rajton kunigi ĉian vorton kun ĉia prepozicio kaj kun ĉia alia vorto" (Z. Krestom. p. 292), eĉ se oni ne trovas koncernan ekzemplon ĉe nia Majstro. Z. uzas POGRANDE, POMALGRANDE, PODUONE, kaj en la vortaro de Korzlinskij, *kontrolita de Z.*, oni trovas: Pomulte, poiomete, popece, poobjekte. Mi ne povas ekvidi ian ajn motivon por escepte malpermesi la prefiksigon de PO antaŭ la vortoj montrantaj tempon, kiel TAGO, HORO, SEMAJNO; k. t. p.

Vi neniam forgesu, ke por esprimi iun ideon ekzistas plej ofte pluraj rimedoj, egale bonaj. Unu lingvo preferas aŭ eĉ uzas ekskluzive iun el tiuj eblaj rimedoj; alia lingvo preferas alian esprimrimedon, sed tiaj preferoj kaj ekskluzivigoj bazas nur sur la kapricoj de la nacilingva uzado, ne sur la logiko kaj komprenebleco. Male, lingvo internacia, lingvo komunehoma ne devas esti ekskluziva; ĝi povas kaj devas akcepti ĉiujn esprim-rimedojn, kiuj estas logikaj kaj ĝenerale kompreneblaj, ĉar tio, kio estas logika kaj ĝenerale facile komprenebla, estas en lingvo internacia taŭga kaj bona. "Tro granda severeco kaj katenado estas superflua... Vantaj senkaŭzaj gustoj naciaj devas en afero internacia tiel same absolute silenti, kiel la gustoj personaj" (Z. L. R.).

Fakulo.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

La plej bona rimedo por subteni esperanton

★

— Mi volonte aĉetus SAT-librojn, se mi havus tempon por legi ilin...

Ne malofte oni povas aŭdi tian diron el la buŝo de fervoraj K-doj, ĉiam pretaj malavare donaci por la esperanta propagando.

Se tiuj K-doj iom pripensus, ili baldaŭ konvinkiĝus, ke la plej certa, la plej fruktodona subteno al esperanto estas ebligi la pliriĉigadon de SAT-Biblioteko.

Lingvo estas ja vivanta laŭproporcie je la verkoj en ĝi publikigitaj.

Ju pli ekzistas esperantaj verkoj, des pli facila estas la poresperanta propagando.

Libro estas fakto, K-doj! Aĉetu do la SAT-librojn, eĉ se vi ne havas tempon por legi ilin.

	Prezo mk. g.
Faŭsto, Goethe	1.20
Eklumo en Abismo, H. Barbusse (broŝ.)	0.80
Malgranda Terbiblio (Prolet. Atlaso), Szeréni	1.80
Proletaria Kantaro (74 kantoj kun notoj)	2.50
Tri Verkoj de Leo Tolstoj	0.80
El la Mondbildo de l' Nova Fiziko, Muravkin	0.60
La Kemio de la Universo, Fersman . .	0.60
Sekspsikologio de S. Ziegler	0.60
La Morto de Blanjo, Jean Tousseul . .	0.60
Ruĝo kaj Blanko de L. Ivn	0.60
La Komunista Manifesto (2-a eldono) .	0.60
Dokumentoj de Komunismo	1.—
Etiko de P. Kropotkin	1.80
ABC de Sennaciismo, V. Elsudo . . .	0.50
Kontraŭ Dio! Ateista Krestomatio . .	0.40
Orienta Blovo	0.40
En Katenoj de la Maljusteco	0.60
Ni Legu! Brunulo. (Internacia Legolibro) (3-a eldono)	1.—
Petro, kursa lernolibro laŭ parola metodo	0.70
Labor-Kajero al Petro	0.30
Karl Marx, Lia Vivo kaj lia Verko . .	0.60
Ŝtato kaj Revolucio, Lenin	1.—
Je la Nomo de l' Vivo, E. Izgur. . . .	2.—

(La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj.)

*

Mendu ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner

Leipzig O 27, Colmstrasse 1

Poŝtĉek-Konto 6835

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Argentino.

K-do *Stzepan Crnić*, Garay, 2466, *Mar del Plata*, dez. koresp. k. ĉ. l. pri div. temoj.

Aŭstrio.

K-do *Thomas Rothauer*, Oberalm 57, *Hallein*, pri div. temoj L, PI, precipe kun Grekio, Javo k. Japanio. Certe resp.

Estonio.

— *Sudaj geĉinanoj!* Mi dez. koresp. kun vi pri ĉ. t. L. Resp. garantiata. Adr.: K-do *S. Tschekanov*, Sovtorgflot, Tallinn.

Francio.

K-do *Arnaud*, 78 rue Paul Bert, *Lyon III*, post longa malsano deziras rekomenci kor.-adon precipe por interrilatigi labororganizojn.

K-do *Paŭlo Medovarsky*, Rue de Lannoy, 630, *Roubaix, (Nord)*, dez. koresp. kun fraŭlinoj k. ĉ. l. pref. el Sovetio.

Germanio.

K-do *Kurt Lösch*, Annaberger Str. 110, *Chemnitz i. S.* dez. koresp. k. ĉ. l. pri Radio k. aliaj temoj. Gek-doj en Sovetio afranku per esp. p. m. Certe resp.

K-do *Johann Panzer*, Leupoldsdorf, Nr. 10 ap. *Wunsiedel* (Bavario) dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. komercartikloj, interŝ. porcelanon kontraŭ samvaloraj objektoj, ne sendas unue. Certe resp.

K-do *Erich Walther, Seifersdorf Post Ursprung i. S.*, dez. koresp. kun gejunuloj pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

LEA-Grupo Ruhla intencas aranĝi esp. ekspozicion. Pro manko de materialo ni petas subteni nin ĉefe per PI el ĉ. l. Adr.: *LEA-Grupo*, Karolinenstr. Gasthof z. Hirsch, *Ruhla i. Th.*

Esp. Grupo dez. koresp. kun geesp-istoj el ĉ. l. pri ĉ. temoj. Akurate resp. Adr.: K-do *Ernst Hanisch*, Uferstr. 14, *Thalheim i. Erzgb.*

Post la Lyona kongreso mi intencas viziti la regionon aŭ de Thiaucourt aŭ de St. Quentin aŭ de Reims. Antaŭe mi volonte interrilatus kun esp-istoj el ĉi-urboj. Sciigoj estas petataj al: K-do *Max Conrad*, Richardshöhe, *Auerbach i. V.*

K-do *Willy Lenk*, Auerhammer, 16-b, *Aue i. Erzgb.*, dez. koresp. k. ĉ. l. krom Holando.

Lab. Esp. Grupo Untermenzing, dez. individuan viglan koresp-adon k. ĉ. l. pri socia vivo, ateismo, sporto, turismo. Interŝ. belajn fotografitajn kartojn. Adr.: K-do *Karl Weber*, Neumeierstrasse 21, *Untermenzing bei München.*

K-do *Max Krauspe*, Bahnhofstr. 4, *Schweidnitz i. Schles.* k. ĉ. l. L, PK, PI, bfl. Tuj resp.

K-do *Aŭg. Gais*, Leonhardsplatz 9 b, *Stuttgart*, dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. lab. temoj, precipe junularmovado. L, PK, PI, bfl. Resp. garantiata.

K-do *Arno Paul*, Thür. Sparkasse, *Zeulenroda*, sendas artpoŝtkarton kontraŭ urbvidajkarto, precipe kun Sovet-Azio.

K-dino *Elfriede Migale*, Triftstr. 16, *Halle a. S.*, dez. koresp. k. ĉ. l. ĉefe kun lernantoj k. komencantoj.

Hungario.

K-do *Johano Dancza*, Knézics Károly-u 13, *Eger*, dez. koresp. pri prostitucio k. ĉ. l. Nur tiuj skribu, kiuj povas k. volas doni al mi seriozajn notojn pri tiu temo.

Jugoslavio.

K-do *Juridlav Imbrišak*, Nova ul. 456, *Koprivnica*, dez. interŝ. PI k. ĉ. l., nepre resp.

Sovet-Unio.

Adresŝanĝo: K-do *Gennadio Krilov*, Sadovaja, 92, kv. 12, *Samara* (stratŝanĝo).

Proletaj Geknaboj tutmondaj!



Redakcio de Ekstrem-Orienta ĉiusemajna por-infana gazeto **"Znamja Pionera"** (Standardo de J. Pioniro) organizis "Internacian Infan-Korespondejon" por peradi al Intern. Koresp. de Sovetiaj prolet-infangrupoj kaj lernejoj kun la eksterlandaj. Infangrupoj! Lernejoj! Sendu al ni viajn adresojn. Komencu korespondadon. Interŝanĝu kun ni per gazetoj, ĵurnaloj, fotoj, artikoloj, libroj ktp. Respondo garantiata.

Aparte Redakcio nia tre deziras **interligiĝi** perletere **kun eksterlandaj redakcioj** de prolet-infanaj gazetoj.

Adreso: **Ĥabarovsk. USSR. Kalininskaja ul. 52.**
Redakcii "Znamja Pionera".
(Por korespondejo.)

Adresŝanĝo: K-do *A. B. Ĥalfin*, ul. Kommunistov, d. 17-a, *Murom*, (antaŭe en Kaŝira).

K-do *N. Bojko*, str. de Franko, 36, 2, *Kiev*, dez. koresp. pri ŝako, PK, L, interŝ. il. gazetojn k. ĉ. l.

25 gekursanoj fer-istoj dez. koresp. pri ĉ. temoj, precipe kun ekstereŭropanoj, L, PI. Resp. garantiata. Adr.: *Krasnodar, I., Klubo Ĵeldor.*

S-to esp. Krasnaja, 32 (por esp. kurso) *Krasnodar.* 15 gekursanoj dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PI. Resp. garantiata.

Klubo Ĵeldor, Krasnodar, I, bezonas koresp-antojn por mur-gaz. pri fervojista vivo en ĉ. l. Ĉiu koresp-anto ricevos resp. pri ĉio interesa vivo de sov. fervojistoj.

K-do *A. Voronko*, Golovskaja, 30, loĝ. 8, *Odessa*, dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

K-do *S. Lejbović*, str. de Mizikević, 46, loĝ. 1, *Odessa*, dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

Adresŝanĝo: K-do *A. P. Lisovskij*, Narkomzem, *Maĥaĉ-Kala* (Dagestan) (antaŭe en Baku).

— Esperanta rondeto ĉe Loka Sindikata Komitato de Administrejo de N. Kaŭkaza fervojo dez. koresp. pri div. temoj k. ĉ. l., ĉiam resp. Adr.: *Rostov/Don*, Pravlenie Sev. Kav. ĵel. dor. Mestkom, dla esperantsk. kruĵka.

K-do *Ilĉjo Kalinin* kaj *K-do Levin A., Oranjerejnoje*, Astrahanskoj gub., dez. koresp. k. ĉ. l. ge-esp-istoj. Interŝ. L, PK, belajn bildojn k. a., ĉiam resp.

K-do *Jak. Avrunin*, (jun. kom.) Puŝkin-str. 37, *Kremenĉug*, pri ĉ. temoj k. ĉ. l. (precipe polit. temoj), L, PK, PM. Resp. garant.

K-do *V. S. Belogorcev* (ruĝarmeano), gvidanto de grupoj de intern. koresp-ado, Artpolk, 21, *Tomsk*, dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l., peras koresp-adon de siaj gvidatoj.

IRH-ANOJ ATENTU!

Organizoj kaj apartaj membroj de IRH estas invitataj korespondi kun sovetiaj membroj de IRH.

Helpu nin kunligadi interrilatojn kun la malliberigitoj kaj persekutatoj pro ilia agado pro bono de l' laborista klaso.

Skribu: **Rajkom Mopr, Sormovo** ap. **N.-Novgorod,** Sovet-Unio.

KONKURSO

La Lab. Grupo en Innsbruck, hotelo "Sonne" (Aŭstrio), invitas ĉiul. Gek-dojn sendi PI. Kiu sendos la plej belan karton, ricevos kiel premion albumon de Innsbruck. Ĉiu karto estos respondata. La findato estos la 1-a de aŭgusto 1927.

La plej popularaj! La plej malkaraj!

Por germanlingvanoj!

Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj de D-ro Emil Pfeffer

aperintaj en la Viena Tagblatt-Biblioteko:

Esperanto in 10 Unterrichts-Stunden. Kun elparolo, gramatiko, ekzercoj, poemoj, traduk-ŝlosilo ktp. Por meminstruo kaj kursoj. 6-a ĝis 10-a milo. **Prezo 0,25 mk. g.**

Erstes Esperanto-Lesebuch für Anfänger und Kurse. Elektita prozo kaj poezio kun laŭvorta germana interlinia traduko kiel ankaŭ lingvaj kaj literaturaj klarigoj. — Serĉado en vortaroj superflua! **Prezo 0,25 mk. g.**

Wörterbuch Esperanto Deutsch. Enhavas ĉiujn de la Akademio akceptitajn vortradikojn kiel ankaŭ la plej komun-uzajn fakesprimojn. (Ĵus aperis). **Prezo 0,25 mk. g.**

Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Ĉirkaŭ 200 paĝoj da teksto kun pli ol 20000 germanaj vortoj kaj 30000 tradukoj. Kvarobla numero ĵus aperis! **Prezo 1.— mk. g.**

Sprechen Sie Esperanto? Enkonduko en la esperantan konversacion. **Prezo 0,25 mk. g.**

Einführung in die Esperanto-Handelskorrespondenz. Esperanta-germana komerca korespondo. (Duobla n-o.) **Prezo 1.— mk. g.**

Postulu senpagan prospekton kun prov-paĝoj de

Tagblatt-Bibliothek, Wien I, Wollzeile 22.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)